

EL POPOLA

ĈINIO

中國報週

5 1984




Amo, Geedziĝo kaj Familio de Ĉinaj Gejunuloj


Fotoj de ĜJI DACENG



Gejunuloj de la kamparo



Geamantoj



Interfianĉigo

Sur la vojo renkon-
te al novedzino





La novaj geedzoj donas bombonojn unu al la alia en la nupto por bonaŭguri dolĉan vivon.



Ĝojo de gepatroj



Geedzoj

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto:

Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN)
Esperanta Sekcio
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

En nupta nokto

Foto de **Jang Jifan**

SUR LA DORSKOVRILO:

1. Gruoj (el putra ligno)

2. Salikokoj (el bovkorno)

Fotoj de **Jen Sijin**

KOLORAJ SERIOJ:

Amo, geedziĝo kaj familio de
ĉinaj gejunuloj

Koko-monto — parko en nubaro
Kandel-lumo

Aŭtonoma Regiono de Interna
Mongolio norde de la antikva
Granda Muro

Popolaj metiartaĵoj de Ŝandong-
provinco

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Petrol-kemia urbo Janŝan apud
Pekino

Studenta ensemblo de la Pekina
Universitato

Amo akompanas ilin	2
La ekonomio de Ĉinio en stabila disvolviĝo	8
Por plibonigi la loĝkondiĉon de urbanoj	12
Verda urbo	16
Sude kaj Norde de la Granda Muro (5): Proksime de Huh- hot	50
Plene profitigi produktivecon de Esperanta vortfarado	19
Ok semajnoj en Ĉinio	22
POR KOMENCANTOJ: Ponto en mia hejmvilaĝo	27
NIAJ PERANTOJ:	
Perado de "El Popola Ĉinio" en Zagrebo	24
Lerni kaj instrui Esperanton	24
ESP-NOVAĴOJ	28
Marŝu al la Olimpikoj	32
Naskiĝo de la super-komputero "Lakta Vojo"	30
Por riĉigi studentan vivon	33
Edzino de ministro (Novelo)	35
Maro ekspluatota	40
VIDINDAJ LOKOJ: Koko-monto — parko en nubaro	26
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Paco kaj milito inter la Norda Song-dinastio kaj Ljaŭ, Okcidenta Ŝja kaj Ĝin	42
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Sindikatoj de Ĉinio	44
POR VIA SANO: Spira gimnastiko por kuraci pulman emfizemon	46
ĈINLINGVA KURSO: Kvina leciono	48
Pri la transskribo de ĉinaj personaj kaj geografiaj nomoj	21
KURANTAJ AFEROJ	15, 49
INTER NI	11
KORESPONDI DEZIRAS	25

JARABONTARIFO			FR Germanio	DM	14.00	Italio	Lit	6000.00	Portugalia	Esc.	500.00		
Aŭstralio	\$A	7.00	Britio	£	4.00	Japanio	Yen	1400.00	Svisio	SF	12.00		
Aŭstrio	Sch	100.00	Finnlando	FMK	30.00	Jugoslavio	Din.	200.00	Usono	US\$	6.00		
Belgio	BF	230.00	Francio	FF	40.00	Nederlando	Gld.	16.00	Kanado	Can\$	7.50		
			Hispanio	Pts	700.00	Nov-Zelando	NZ\$	8.00					
Por aliaj landoj en Eŭropo:			£	4.00	US\$	6.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:			£	2.80	US\$	4.00

AMO AKOMPANAS ILIN

— PRI LA AMAFERO, GEEDZIĜO KAJ FAMILIO

DE ĈINAJ GEJUNULOJ

LA pli-ol-50-jara komizo Ĝang Ĝjanmin de la Pekina Magazeno ankoraŭ freŝe memoras sian pasintaĵon, ke oni revokis lin al la hejmvilaĝo pro lia edziĝo.

Tio okazis antaŭ pli ol 30 jaroj. Tiam Ĝang laboris kiel metilernanto en Pekino. Li ne sciis, kiel aspektas lia fianĉino. Kiam la novedzino en ornamenta palankeno estis portita en lian hejmon, li deziris al si, ke li ne ricevu variolulinon aŭ lamulinon.

Demetinte ruĝan tukon de sur ŝia vizaĝo, li vidis larmoplenan knabinon. Kun granda ĉagreno li edziĝis al tiu fremda knabino, kiu maltrankviliĝis pri sia estonteco.

La edziĝo de Ĝang estis de malnova tipo de Ĉinio. En la tiama socio la gefianĉoj devis tute obei siajn gepatrojn kaj svatanton. Tia deviga geedzigo kun komerca karaktero detruis la amon, la feliĉon kaj eĉ la vivon de sennombraj gejunuloj. Sed estis strange, ke tia geedzigo ne malfeliĉigis Ĝang. "Poste mi trovis ŝin ne malbela," li humure diris al mi. "Ni unue geedziĝis kaj poste enamiĝis. Mi amas ŝin pro ŝia diligenteco kaj virto. Ni vivas bone."

Aprile de 1950, duonjaron post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la popola registaro publikigis la geedziĝan leĝon, kiu propagandas memdecidan geedziĝon kaj egalrajtecon de la viroj kaj virinoj kaj malpermesas devigan geedzigon, geedzigon kun komerca karaktero, bigamion kaj posedon de kromedzino.

Malgraŭ ke la profunda tradicia ideologio ekzistanta jarmilojn ankoraŭ obstinas kaj la malracia geedziĝo ankoraŭ okazas diversforme en diversaj lokoj, plejparto de la modernaj ĉinaj gejunuloj jam malobservis la malutilajn, malnovajn

morojn, akiris aŭ libere serĉas sian belan amon. Kiel do ili enamiĝas kaj geedziĝas? Ĉu oni svatas? Kiajn amatojn la gejunuloj deziras? Kia maniere ili festas sian nupton? Ĉu ili bele vivas post la geedziĝo?

AMO BURĜONAS

ĈI TIE

Iam mi vizitis junan paron, kiu laboras en la Pekina Tapiŝfarejo. En la sama farejo ili ne havis multajn ŝancojn por kontaktiĝi. Printempe de la pasinta jaro la farejo organizis laboristan ekskurson. En la kolektiva aktivado ili interproksimiĝis kaj enamiĝis.

Nun estas kompare malmultaj okazoj por la ĉinaj gejunuloj interkonatiĝi. Nur nemultaj el ili mem havigis al si amat(in)on. Tial ili sin turnas al la laboristaj sindikatoj, la Komunisma Junulara Ligo, siaj parencoj aŭ amikoj, ke ili faru al ili svatadon. Tio estas ĉefa svat-formo en Ĉinio. Oni ne devas paraleligi la novajn svatantojn kun la malnovaj svatistinoj. La tasko de svatanto estas rilatigi la gesvatitojn, reciproki iliajn informojn kaj fotojn. Se ili montras sin kontentaj unu pri la alia, la svatanto proponas konvenajn tempon kaj lokon por ilia rendevuo. Post tio la svatanto do faras nenion krom atendi la ĝojigan informon.

Mi konatiĝis kun paro da junaj geamantoj. Svatite, ili interkonatiĝis kaj en la kontaktadoj pli profunde konis kaj amis unu la alian. La junulo nomata Ma Ŝjuhŭa estas laboristo de la

Pekina Dua Aŭtofabriko, kaj lia amatino U Gŭo-jing laboras en la Ŝtata Meteologia Buroo. Ma diris: “Ni ambaŭ estis sinĝenaj je la unua renkontiĝo. Inter la knabegoj mi havis lertan langon, sed balbutis antaŭ la knabino. Mi kaŝe ĵetis oblikvajn rigardojn al ŝi kaj ŝia beleco kaj mildeco vekis mian ŝaton. Post longa silento mi fine faris al ŝi parolon. Dum nia interparolo mi eksciis, ke ŝi lernas en televida universitato. Mi diris al ŝi, ke ankaŭ mi studas en la sama lernejo la administradon de industria entrepreno. Nia babilo ekfluis torente. En ŝiaj mildaj kaj brilaj okuloj mi legis ŝian amikecon al mi. Sed ĉe la adiaŭo mi demandis ŝin, kun iom da maltrankvilo: ‘Ĉu ni povas revidiĝi?’ Ŝi kapjesis. Tiel ni interkonsentis la tempon kaj lokon por alia rendevuo.”

Poste ardiĝis ilia amo. Komence ili renkontiĝis en kaŝa loko por eviti la konatojn kaj iom post iom aperadis jam en parkoj kaj teatroj aŭ sur stratoj. Pli kaj pli oftigis ilia rendevuo. Se ili ne intervidiĝus unu tagon, ili kvazaŭ travivus tri jarojn. Nun ili sin preparas por geedziĝo.

Antaŭ kelkaj jaroj, en grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio ekfunkciis svatagentejoj fonditaj de virina federacio, Komunisma Junulara Ligo kaj laboristaj sindikatoj. Tiajn agentejojn establis ankaŭ iuj grandaj fabrikoj. Foje mi vizitis la Svatagentejon de Ĉaŭjang-distrikto en Pekino. Dum malpli ol du jaroj la agentejo svatis 3 000 gejunulojn, el kiuj 700 paroj starigis amrilaton kaj iuj jam fondis familion.

Ankaŭ la gepatroj klopodas havigi amat(in)on al sia fil(in)o, tamen ili rolas nur kiel ponto kaj lasas lin (aŭ ŝin) mem fari decidon. Evidente tio estas tute alia ol la malnova deviga maniero.

Inter la gejunuloj troviĝis ankaŭ tiuj, kiuj mem havigis al si amat(in)on. Oni povas facile trovi, ke tiu fenomeno interese ŝanĝiĝas: En la kvin kaj sesdekaj jaroj ofte knabegoj petis la manon de knabinoj, dum tiuj, se korinklinaj al la knaboj, ne eldiris sian penson. Sed nun nemalmultaj knabinoj la unuaj petis la amon de junuloj sen ajna honto. Tiel statis la filo de mia kuzino kaj lia amatino.

Nun ankaŭ la kamparaj gejunuloj de Ĉinio uzas sian rajton de ama libereco. Iuj el ili naskiĝis kaj pasigis sian infanaĝon en sama vilaĝo kaj poste fariĝis nedisigeblaj kunuloj. Aliaj vivis en la najbara vilaĝo, enamiĝis dank’ al ies svatado kaj poste fondis feliĉan familion. Geedziĝis eĉ



Rendevuo post laboro

gejunuloj malsame bonhavaj kaj klerigitaj. Junulo Hŭang Hongŝeng, instruisto de mezlernejo de Songŝjan-gubernio, Henan-provinco, enamiĝis al samvilaĝa knabino Ŭang Suĝen. Post la geedziĝo ili helpis unu la alian kaj profundigis sian amon.

En la kamparo, precipe en tiuj ekonomie kaj kulture postiĝitaj regionoj, ankoraŭ ekzistas deviga geedzigo fare de iuj gepatroj en kaŝa formo kaj geedzigo kun komerca karaktero. La dua montriĝas en tio, ke la gepatroj de la fianĉino postulas multajn donacojn (monon kaj objektojn) de la estonta bofilo. Tia stultaĵo perdis al iuj gejunuloj la amon kaj feliĉon. Kompreneble oni pli kaj pli severe kondamnas tian faron influitan de la malnova socio kaj iom post iom malaperigis ĝin, kun helpo de la leĝo.

La gejunuloj elektas sian amat(in)on laŭ kondiĉoj. Mia amikino petis min svati ŝian filinon. Mi demandis la knabinon, kian junulon ŝi deziras. Komence ŝi kaŝis sian penson pro honto, sed poste diris, ke ŝi volas belan viron kun faka scio, almenaŭ 1.75-metre altan, afablan, malkaŝeman,

modestan kaj mildan. Ĉar la knabino mem estas bela kaj inteligenta, kompreneble ŝi esperas taŭgan junulon. Ŝia elekto estas tipa por la junaj ĉinaj fraŭlinoj, kiuj simpligis tiajn kondiĉojn kiel AVF (t.e. junulo alta, vigla kaj faka estas dezirinda). Fakte iuj knabinoj preterlasis bonŝancojn pro elektemo.

Laŭ enketo de la Tutlanda Virina Federacio farita en kvin distriktoj de Pekino, 80-90% de la 24-26-jaraj fraŭlinoj havas realan deziron. Ili deziras amaton honestan, diligentan, mildan kaj progreseman. Nur tre malmultaj volas ekskluzive riĉan kaj belegan junulon.

FINE VENAS LA TAGO DE GEEDZIĜO

Post certa tempo da konstanta kontaktado kaj interkompreniĝado la geamantoj ligitaj per komuna idealo metas en sian tagordon la problemon pri geedziĝo, la plej grava paŝo en la amo.

Estas granda diferenco inter la geedziĝo de la modernaj ĉinaj gejunuloj kaj tiu de iliaj gepatroj kaj geavoj, kiuj travivis jarojn en la malnova socio. Tiam oni devis elekti "bonaŭguran tagon" por la geedziĝo. En la edziĝofesto la vilaĝaj novgeedzoj devis fali genue kun kapo teren por kulti la prapatrojn, la ĉielon kaj la teron, alie ilian geedziĝon oni ne agnoskis. Por sia edziĝo la novedzo devis doni rimarkindan nombron da donacoj al la familio de siaj bogepatroj kaj fari feston por parencoj kaj amikoj. Pro tio multaj malriĉuloj dronis en ŝuldoj kaj iuj eĉ bankrotis. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la malnovtipa edziĝofesto eksmodiĝis por la modernaj gejunuloj. Sendube, geedziĝo estas grava afero en la homa vivo. Kun pli kaj pli alta leviĝo de la vivnivelo, la gefianĉoj kaj iliaj gepatroj volas fari edziĝofeston kompare pompa kaj gaja.

Nun en nia lando, antaŭ sia geedziĝo la junaj gefianĉoj multe klopodas por havigi al si

novan loĝejon. Nun ekzistas fenomeno, ke al la ĉinaj urboj mankas loĝdomoj. Kvankam oni konstruis multajn novajn domojn en diversaj lokoj de la lando, tamen tio ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la ĉiam kreskanta loĝantaro. Multaj junuloj, kiuj atingis la aĝon de edziĝo kaj kies gepatroj ne havas sufiĉe vastan loĝdomon, petas loĝejon de sia fabriko aŭ oficejo. Kaj oni plenumas ilian peton laŭ iliaj aĝo kaj servodaŭro.

Sian novan loĝejon la novgeedzoj faris laŭeble eleganta. Kompreneble antaŭ sia geedziĝo ili kalkis la ĉambron kaj lakis la pordon kaj fenestrojn. Oni povas vidi ilian loĝejon meblitan per modernaj lito, spegulŝranko, manĝotablo, seĝoj, skribotablo, sofo kaj vitra ŝranko por trinkilaro. En grandaj urboj la meblovendejoj ne povas kontentigi la vastan klientaron. Iuj junuloj do aĉetis lignon kaj dungis lignaĵiston por fari modernajn meblojn. En iliaj novaj loĝejoj troveblas elektraj ekipaĵoj, kiel televidilo, elektra ventumilo, radiomagnetofono, lavmaŝino, kiujn antaŭ kelkaj jaroj nur malmultaj havis en Ĉinio. La bonhavaj junuloj aĉetis ankaŭ friduojn. Kompreneble per sia propra ŝparmono la novgeedzoj ne povas havigi al si tiom da objektoj. Iliaj gepatroj do volontas donas al ili monhelpon.

Estas multe pli grandaj la novaj domoj de la vilaĝaj novgeedzoj. Preskaŭ ĉiu kamparano, kiu havas filon, delonge preparas konstrui domon por lia edziĝo. Dum longa tempo la tuta familio vivas modestan vivon, ŝparante ĉiun moneron por aĉeti brikojn kaj lignon, tiel ke ĝi povu tuj entrepreni dom-konstruadon, kiam la filo plenkreskos. Dum la lastaj jaroj la kamparanoj enspezis pli kaj pli multe. Iuj el ili, ne kontentaj pri la ĉina tradicia unu-etaĝa loĝdomo, ekkonstruis elegantajn du-etaĝajn domojn kun balkonoj. Tio estas neeblo por la urbaj junuloj.

En la kamparo oni donas grandan atenton al farado de delikataj vestoj por siaj edziniĝontaj filinoj. En iu vilaĝo sude de Jangzi-rivero mi vidis, ke iu maljunulino dungis tajloron por fari vintran silkŝtofan veston el silka vato kaj satenan superveston por ŝia edziniĝonta filino. Ŝi preparis por ŝi ankaŭ vestojn por ĉiuj sezonoj. La maljunulino diris al mi, ke preskaŭ ĉiuj familioj de la loko faras la samon.

Kiam la domo, mebloj kaj dotaĵo estas preigitaj, proksimiĝas la tago de geedziĝo. La dato estas difinita de la gefianĉoj kaj iliaj gepatroj. Nun oni ne atendas ian "bonaŭguran tagon", tamen preferas okazigi la geedziĝan ceremonion en la Novjara Tago, Printempa Festo, Unua de Majo aŭ Nacia Festo. En la tagoj proksimaj al la geedziĝo la gefianĉoj sin registras pri la geedziĝo ĉe la oficejo de la loĝkvartala komitato en la urbo aŭ ĉe la subdistrikta registaro en la vilaĝoj. Al la registristo la gefianĉoj devas montri siajn domlibretojn kaj la rekomendajn leterojn skribitajn de iliaj oficejoj, kaj doni du siajn bustajn fotojn. Demandinte ilin pri iliaj nomoj, aĝoj, naciecoj kaj amafero, la registristo donas al ili formularon por pleniĝi. Tio garantias la praktikadon de monogamio, preventas bigamion, fruan geedziĝon kaj aliajn kontraŭleĝajn agojn. Li ankaŭ atentigas ilin pri naskolimigo kaj malfrua gravediĝo. Post tio ili ricevas po unu belan edziĝateston kun sia foto.

Laŭ ĉina tradicia moro la novgeedzoj devas okazigi ceremonion, sin montri antaŭ siaj parencoj kaj amikoj kaj regali ilin per bombonoj, alie ili, eĉ registritaj, ne povas esti rigardataj kiel "laŭleĝaj" geedzoj. Tial ili kaj iliaj gepatroj volas fari viglan ceremonion.

Antaŭvespere de la Printempa Festo de la kuranta jaro mi ĉeestis la geedziĝan ceremonion de juna paro. Ilia ĉambro estis meblita tre bele: la blankaj muroj kontrastas kun fenestra kurteno el verdeta gazo. Sur la fronta muro algluiĝas du grandaj ĉinaj ideografiaĵoj "Duobla Ĝojo" eltonditaj el ruĝa papero, simbolantaj feliĉon. Sur la skribotablo estas ilia vitre kadrita foto: blua ĉielo, blankaj nuboj, vertikala bordo, ombro de arbo... en plata boato sidas knabino kun kapo klinita sur ŝultro de junulo. Tio signifas, ke ili eltenos ĉian ventegon kaj pluvegon en la sama boato. Sur muro pendas pentraĵo de pino kaj umearbo, kiu aludas, ke la amo de la novgeedzoj estas tiel bela kaj eterna kiel la plantoj. La tablo estas plena de diversaj belaj metiartaĵoj, ŝtofoj kaj ĉiutagaj vivbezonaĵoj donacitaj de iliaj parencoj kaj amikoj.

Venis la gastoj, kaj la prezidanto de la ceremonio deklaris ĝin malfermita. La novgeedzoj starantaj inter la ĉeestantoj riverencis unue al la

ceremoniestro, la gepatroj kaj la gastoj por danki ilin kaj poste unu al la alia. Ilin benis la ceremoniestro kaj gastoj. Laŭ la peto de ĉeestantoj la novgeedzoj rakontis pri sia amafero. Poste ili komencis prezenti programerojn. La petolaj knaboj ne lasis ilin havi spirhalton. Iu el ili levis pomon ligitan per fadeno kaj balancis ĝin antaŭ la novgeedzoj, petante, ke ili samtempe mordu ĝin. Tia "programero" estas bonvena en la geedziĝaj ceremonioj. Fakte oni ne celis, ke ili mordu la pomon, sed intencis vidi la gajan scenon, ke iliaj vizaĝoj interpuŝiĝos, kiam ili malsukcesos mordi la pomon. Kun ĉiu malsukceso oni eksplodis de rido. En tiu momento ardis la atmosfero de la ceremonio.

Iuj ankaŭ donas festenon post tia simpla ceremonio. En la urboj oni aranĝas la festenon en sia hejmo aŭ en restoracio, kaj en la vilaĝoj senescepte hejme. Nun oni pledas por festado laŭ nova moro kaj malaprobos paradon, luksemon kaj malŝparemon.

De la lastaj jaroj furoras kolektiva geedziĝa ceremonio: ordinare unu aŭ pluraj laboristaj sindikatoj kaj diversnivelaĵoj organizoj de la Komunisma Junulara Ligo aranĝas la ceremonion de kelkaj kaj eĉ kelkdek junaj paroj. Oni iluminas la lokon de festado kaj krakigas petardojn. Ne nur la parencoj, amikoj kaj oficejestroj gratulas la feli-

*Novgeedzoj ricevas edziĝ-
ateston en registrejo.*



ĉajn gejunulojn, sed ankaŭ arta trupo faras belan prezentadon. Tia festado estas ekonomia kaj simpla, solena kaj gaja.

En la pasintaj jaroj pli kaj pli da junaj geamantoj ekŝatis mielmonatan vojaĝon. Post la simpla ceremonio ili vizitas famajn urbojn kaj vidindajn lokojn. Hoteloj en multaj lokoj pretigas por ili apartajn ĉambrojn kaj turismajn aŭtomobilojn, por ke ili agrable pasigu sian mielan tempon.

ĜOJO DE NOVA FAMILIO

“Geamantoj fine fariĝu feliĉa paro.” Tiu malnova ĉina popoldiro estis apenaŭ realigebla sub la malnova edziĝosistemo. Nur nun pro la ama libereco kaj memdecida geedziĝo ĝi havas aktualan signifon. Familio fondita sur tiu bazo vivas harmonie kaj feliĉe.

Post la geedziĝo modernaj junulinoj, ankaŭ iuj junuloj, kunvivas kun siaj bogepatroj, sed plejparto de la novgeedzoj komencas novan vivon aparte de siaj gepatroj.

Nuntempe la edziniĝintaj ĉinaj virinoj havas okupon aŭ partoprenas en kamplaboroj kaj mastumas kune kun siaj edzoj la hejman ekonomion. Ĝenerale la geedzoj povas respekti unu la alian. Ili vivas pace, bele kaj trankvile. Oni jam senkreditigis feŭdismajn vidpunktojn, kiel “estimo al viroj kaj malestimo al virinoj” kaj “obeo de virinoj al viroj”. La pozicio de la virinoj en la socio kaj la familio multe pli altiĝis ol antaŭe.

Antaŭ kelkaj jaroj Hu Julan, monda tablotenisa ĉampionino antaŭ dek jaroj kaj nun trejnistino de la Ĉina Virina Tablotenisa Teamo, edziniĝis al scienca laboranto Ŝen Ŭejming. Ŝia edzo kun plena koro al sia kariero tamen tutforte subtenis ŝian laboron. Malgraŭ sia okupiteco li ofte rigardis trejnadon de tablotenisistinoj kaj donis konsilojn al sia edzino. La geedzoj bone interkonsiliĝis pri la hejmaj aferoj, komprenis unu la alian kaj kune faris la hejmlaborojn. Por kulturi novi-

cojn, Hu Julan, kiu aĝas jam pli ol 30 jarojn, intencis prokrasti sian gravediĝon. Tio estis plene aprobita de ŝia edzo.

Laboristino Nuguguli de la Ŝinĝjang-a Petro-la Administracio amis fraŭlon Daŭti kaj edziniĝis al li. Dek jarojn post la geedziĝo ili ankoraŭ tenas sian sinceran amon, zorgas unu pri la alia kaj fidas sin reciproke. Ili montras sin indulgaj, kiam al ili okazas konflikto. Ili ne nur bone plenumas sian oficon kaj dommastrumadon, sed ankaŭ pacience edukas sian infanon. Dum sinsekvaj jaroj ili estis elektitaj kiel avangardaj laborantoj. Ankaŭ ilia infano ricevis altajn notojn.

Eĉ se la novgeedzoj kunvivas kun siaj gepatroj aŭ geavoj, ili vivis ne tiel sinĝene kiel en la familioj de malnova tipo. Kompreneble, por tion atingi, la juna geedza paro devas teni bonajn rilatojn inter si, respekti kaj obei la gemaljunulojn, sed precipe la juna mastrino devas bone trakti sian bopatrinojn. En vilaĝo de Hulan-gubernio, Hejlongĝjang-provinco, oni laŭdis elstaran bofilinon Feng Ŝulan, kiu estis virta, malkaŝema kaj diligenta, simpatia al la edzo kaj zorgema al la bogepatroj. Pasintjare, kiam ŝia bopatro estis paralizita kaj ŝia bopatrino malsaneta, ŝi ĉiam portis manĝaĵojn al la bopatro kaj manĝigis lin kuleron post kulero. Ŝi preparis bongustaĵojn plaĉajn al la maljunulo. La samvilaĝanoj unuvoĉe laŭdis ŝiajn noblajn agojn. Ankaŭ Lihŭa, la edzino de mia frato, kunvivas kun miaj gepatroj. Ili tenas intimajn rilatojn inter si. Neeviteble la gemaljunuloj iafoje grumblis kontraŭ sia bofilino. Sed ŝi ĉiam sin detenis de koleriĝo. Eĉ kiam la gemaljunuloj eraris, ŝi ne Krude refutis, sed faris mildan persvadon. Mia patrino ofte diris al mi, ke ŝi havas bonan bofilinon.

Vere iam okazas la mallaŭdindaj aferoj, ke bopatrino malpacas kun bofilino kaj gefiloj malrespektas kaj eĉ krude traktas siajn gepatrojn. Sed tion ĉiam kondamnas la publiko, kritikis la ĵurnalo kaj la malobservantoj de la leĝo estas punataj.

Ĉinio havas tro da loĝantoj. Por la naskolimitigo la popola registaro alvokis malfruan edziĝon kaj malfruan gravediĝon, alprenis serion da rimedoj por la naskobridado kaj eŭgeniko kaj kuraĝigis ĉiun geedzan paron naski nur unu infanon.

Hodiaŭ la urbaj novgeedzoj ne tuj deziras bebon. Mi intervjuis paron da ordinaraĵ gelaboristoj, kiuj ĵus geedziĝis. La novedzino Ĝu diris al mi: "Ni estas junaj kaj aferoplenaj. Mi lernas en la vespera universitato de la fabriko kaj portempe ne deziras bebon." Ŝia edzo Dŭan Ŝuting aldonis: "Ni ja amas distriĝi. Ni ofte ekskursas en dimanĉo kaj festotago. Kun bebo oni malfacile povas tion fari. Tial ni decidis konsideri la problemon post du jaroj." Sed la vilaĝaj novgeedzoj volas tuj havi bebon, eble influite de la malnova popoldiro "frua filo alportas fruan feliĉon". La kamparanoj estas realismaj, ĉar frua infano donas fruan helpon en iliaj kamplaboroj.

La popola registaro de Ĉinio alvokas, ke la junaj gefianĉoj havu seriozan sintenon al la geedziĝo favore al la fondo de harmonia kaj stabila familio. Sed oni permesas eksedziĝon de tiuj paroj, kiuj pro diversaj kaŭzoj vivas malharmonie kaj jam perdis la amon. La geedziĝa leĝo donas al civitanoj eksedziĝan liberecon.

La nova geedziĝa leĝo publikigita en 1980 denove traktis tion kaj donis plian klarigon. Laŭ juristo de la Pekina Supera Juĝejo, la procentaĵo de eksedziĝo povas kreski dum mallonga tempo post la validiĝo de la nova geedziĝa leĝo, kio ne

daŭros kontinue, ĉar oni havas amon sur fidinda bazo.

Laŭ statistiko, en Pekino 148 000 junaj paroj geedziĝis en 1980, dum 3 900 paroj eksedziĝis en tiu jaro. Kaj en la kamparo la eksedziĝa procentaĵo estis multe pli malalta.



Novgeedzoj trinkigas unu la alian ĉe la nupto.



Gaja familio

LA EKONOMIO DE ĈINIO EN STABILA DISVOLVIĜO

DUM sia akcepto al fama uso-
na fizikisto Chen-ning
Yang en la fino de la pasinta
jaro, Deng Ŝjaŭping diris, ke en
la jaro 1985 Ĉinio povos antaŭ-
tempe atingi la normojn de la in-
dustria kaj agrikultura produkta-
do difinitajn en la Sesa Kvinjara
Plano (1981-1985). Li montris,
ke laŭ la praktika sperto en la
lastaj jaroj, Ĉinio espereble efek-
tivigos en la fino de la kuranta
jarcento la celon difinitan de la
Dekdua Kongreso de la Komu-
nista Partio de Ĉinio kvarobligi
la industrian kaj agrikulturan
produktovaloron.

La ciferoj publikigitaj de la
Ŝtata Statistika Buroo konfirmis


liajn vortojn, kio ankoraŭfoje
montris, ke Ĉinio trovis ĝustan
vojon por disvolvi sian ekono-
mion.

En 1985 estis antaŭdate atin-
gita la totala produktovaloro de
industrio kaj agrikulturo kaj la
produktokvanto de greno, koto-
no, energio, ŝtalo, ŝtalaj materia-
loj, cemento, kemia sterko kaj
sulfura acido difinitaj de la Sesa
Kvinjara Plano por 1985. Laŭ
tiu plano la totala produktovalo-
ro de industrio kaj agrikulturo
en 1985 estos 871 miliardoj da
jŭan-oj (ĉ. 435.5 miliardoj da
usonaj dolaroj), kaj la produkto-
valoro de industrio kaj agrikul-
turo pliiĝos je 4% ĉiujare kaj

laŭeble je 5% dum plenumado.
La rezulto de la plenumado en la
lastaj tri jaroj montris, ke la tota-
la produktovaloro de industrio
kaj agrikulturo de 1983 atingis
ĉ. 890 miliardojn da jŭan-oj kaj
pliiĝis meznombro je 7.2% ĉi-
jare. Ĝi jam superis la taksitajn
normojn en multaj flankoj.

**Sinsekvaj riĉaj rikoltoj aperis
en la agrikultura produktado kaj
prosperis disvolviĝis la produkta-
do de agrikulturaj komercaĵoj.**
La grena produktokvanto leviĝis
de 320.56 milionoj da tunoj en
1980 al 380 milionoj da tunoj en
1983. La kotona produktokvan-
to leviĝis de 2.707 milionoj da
tunoj en 1980 al 4.5 milionoj da
tunoj en 1983. En la lastaj tri
jaroj la ĉiujare kreskanta pro-
duktokvanto de greno kaj kotono
multe superis tiun de la pasintaj
periodoj. Komencis raciigi la
interna strukturo de agrikulturo
kaj iom post iom altiĝis la pro-
porcio de produktovaloro de for-
stumado, brutobredado, fiŝkaptado
kaj kromokupo en la totala
produktovaloro de agrikulturo.

**Kreskis la produktado en ĉiuj
industriaj branĉoj.** La totala in-
dustria produktovaloro de 1985
kreskis je 10.2%, dum tiu de
1982 je 7.7%. Post plurjara reor-
digo la produktado kaj ŝparado
de energio akiris rimarkindajn
sukcesojn. La materiala, maŝina
kaj elektronika industrioj progre-
sis en plivastigo de serva kampo
kaj en altigo de adaptiĝa povo
kaj altiĝis la kvaliton de plej-
multo de siaj produktaĵoj. La



*Transporto de
karbo el la Liŭ-
panŝuj-a Karbo-
bazo, Gujĝoŭ-pro-
vinco, al alia loko
de Ĉinio*

malpeza kaj tekstila industrioj havis novan progreson en altigo de produktokvanto kaj plimultiĝo de specoj. Ŝanĝiĝis la stato, ke la peza industrio disvolviĝis tro rapide kaj la malpeza tro malrapide en la pasintaj jaroj.


Iom boniĝis la financa situacio. En 1979 kaj 1980 aperis defecitoj de 17 miliardoj kaj 12.7 miliardoj da ĵuan-oj en la ŝtata financo. Ekde 1981 la ŝtato plue reordigis la nacian ekonomion kaj ellaboris severan ekonomian disciplinon por pliigi produktokvanton kaj enspezon, tiel ke ĝia financa defecito reduktiĝis al 3 miliardoj da ĵuan-oj kaj pli-malpli efektiviĝis speza ekvilibro. La financa enspezo de nia lando komencis leviĝi en 1982 kaj iom pliĝis en 1985.

La fundamenta konstruado akiris novajn sukcesojn. La Sesa Kvinjara Plano difinis 890 grandajn kaj mezgrandajn konstruajn objektojn, el kiuj 400 devas finkonstruiĝi por produktado. El ili pli ol 280 jam estis finkonstruitaj kaj komencis produkti en la unuaj tri jaroj. La jaraj planoj de 70 grandaj kaj mezgrandaj konstruaj objektoj estis plenumitaj aŭ superplenumitaj. La gravaj konstruaj objektoj de energio kaj trafiko atingis certajn sukcesojn. En la unuaj tri jaroj de la Sesa Kvinjara Plano la ekspluata povo de karbo pliĝis je pli ol 38 milionoj da tunoj, tiu de nafto je pli ol 19 milionoj da tunoj, la kapacito de generatoroj je pli ol 9.7 milionoj da kilovattoj, la longeco de la fervojoj je pli ol 600 kilometroj kaj la ŝarĝokapablo de la havenoj je 40 milionoj da tunoj. Tio havas gravan signifon por akceli la disvolviĝon de la industria kaj agrikultura produktado.

Multe disvolviĝis la scienca, eduka, kultura kaj medicina afe-



Rikoltado en la ĵarmejo Hŭangĵangtan de Ningŝja



Termoelektrajo kun totala kapacito de 250 000 kilovattoj en Ĝeĝĵang-provinco



Loĝdomoj por ŝipanoj de Jangzrivero

branĉoj de la nacia ekonomio.

Altiĝis la vivnivelo de la popolo. Post la ekonomia reordigo, samtempe kun la disvolvo de la industria kaj agrikultura produktado, la ŝtato reordigis proporciojn de la konsumo kaj akumulo, pliiĝis salajron de la oficistoj kaj laboristoj, starigis kaj restarigis sistemojn doni premion kaj kromsalajron, multe altiĝis la aĉetan prezon de agrikulturaj kaj kromokupaj produktaĵoj kaj tiel solvis urĝe solvendajn problemojn en la popola vivo. Rapide pliiĝis la enspezo de urbanoj kaj kamparanoj. Laŭ enketo de la Ŝtata Statistika Buroo, ĉiu membro de la oficistaj kaj laboristaj familioj enspezis meznombre 500 jüanojn en 1982 por sia vivteno. La enspezo pliiĝis je 8.3% kompare kun tiu de 1978 (oni jam deklulis la diferencon kaŭzitan de prez-altiĝo). La enspezo en 1983 pliiĝis je pli ol 6% kompare kun tiu en 1982. La pura enspezo de ĉiu kamparano meznombre estis 270 jüanoj en 1982, je 67% pli multe ol tiu de 1978 (oni jam

roj. En la lastaj tri jaroj Ĉinio akiris grandajn sukcesojn en scienco kaj tekniko. Preskaŭ efektiviĝis 38 gravaj scienc-es-

ploraj taskoj difinitaj de la ŝtato por la Sesa Kvinjara Plano. 40 gravaj sciencaj kaj teknikaj fruktoj vaste aplikigis en diversaj



Superklasa instruistino Ŭang Lan donas lecionon al lernantoj.

dekalkulis la diferencon kaŭzitan de prez-altiĝo). La enspezo en 1983 pliiĝis eble je 10% kompare kun tiu de 1982. La valoro de podetala vendo de la sociaj komercaĵoj en 1983 atingis 284 miliardojn da ĵuan-oj, meznombro je 9.9% pli multe en ĉiu el la lastaj tri jaroj.

La supraj materialoj montris, ke la nacia ekonomio de Ĉinio disvolviĝas stabile kaj sane.

Tamen sur nia vojo ankoraŭ troviĝas problemoj. La ekonomia efiko iom altiĝis en produktado, konstruado kaj mon-cirkulado, sed ĝi ne estas tre granda, kaj krome, ankoraŭ ne estis tute ŝanĝita la stato de granda konsumado de energio kaj materialoj kaj malbona kvalito de iuj produktaĵoj. Ĵus komenciĝis la reordigado de la produkta strukturo de agrikulturo kaj industrio. Ankoraŭ ne estis tute reordigitaj la rilatoj de la ekonomi-administra sistemo, salajra sistemo, produktado kaj mon-cirkulado. Ankoraŭ malalta estas la centralizado de la ŝtata financo. Ankoraŭ ekzistas malfaciloj por efektiviĝi ekvilibron de la financo, precipe de la kredito. La liverebla kvanto de komercaĵoj ĝenerale povas respondi al la socia aĉet-povo, sed la produkta strukturo de la konsumado ne povas esti konforma al la ŝanĝiĝo de la konsumo bezono. Iuj malkaraj, belaj kaj nov-tipaj konsumadoj ne estas sufiĉaj. Tial ni devas daŭre klopodi por plenumi la normojn difinitajn de la Sesa Kvinjara Plano kaj realigi radikalan boniĝon de la ŝtataj financo kaj ekonomio.

* La aŭtoro estas vicestro de la Buroo de Ĝenerala Planado sub la Ŝtata Planada Komisiono.



Bonvena estas reaperigo de niaj artikoloj kaj fotoj

Iuj legantoj demandis nin, ĉu oni rajtas reaperigi la artikolojn kaj fotojn de EPĈ. Pri tio ni jam publikigis sciigon en la unua numero de la kuranta jaro. Nun ni refoje certigas nian bonvenigon al tio.

Fakte, en la lastaj jaroj nemalmultaj fervoraj legantoj kaj revuoj jam tion faris. Laŭ nekompleta statistiko, de julio, 1980 ĝis decembro, 1983 23 gazetoj de 15 landoj 47-foje reaperigis niajn artikolojn, informojn, fotojn kaj bildojn. Jene ni listigas kelkajn gazetojn, kies redakcioj reprenis niajn artikolojn kaj fotojn en 1983:

«Informa Letero», organo de la Portugala Esperanto-Asocio, reaperigis en la n-ro 1-a, 1983, du noveletojn kun ilustraĵoj «Printempa Nokto» kaj «Adiaŭo» de EPĈ, kaj en sia dua numero «La lastaj meteo-notoj de du sciencistoj» de nia revuo.

«Esperanta Mormonaro», organo de Por-Esperanta Mormonaro en Usono, reaperigis en la n-ro 2-a, 1983, la artikolon de la sesa numero, 1982 «Kio estas Esperanto kaj kia estos ĝia estonteco» kun foto de ĝia aŭtoro.

«Komuna Esp.-Gazeto» de Nederlando publikigis en la n-ro 6-a, 1983 la artikolon «Manko de greno al disvolviĝantaj landoj» de la kvara numero de EPĈ en la sama jaro, kaj en sia sepa numero «Kelkaj kuracprincipoj de la tradicia ĉina medicino» de la kvina numero de EPĈ, 1983.

«Rivivere» de Italio publikigis en la n-ro 8-a, 1983, la artikolon «Inter la argilaj figuroj de Qin-dinastio» kun fotoj de la unua numero de EPĈ en la sama jaro. Ĝin tradukis en la italan lingvon nia abonanto LUIGI TADOLINI.

«Adresseavison UKE-Adressa» de Norvegio en la felietono de la n-ro 10-a, 1983, publikigis informon pri la ĝenerala nombrado de la ĉina loĝantaro. Ĝi estis reverkita de niaj abonantoj Ove Kjensvik kaj Evling Anker Hangen laŭ la koncernaj artikoloj de la unua numero de EPĈ en la sama jaro.

Ankaŭ la Esperanta revuo «Mundo» de Svedio publikigis en la 188-a numero, 1983 informon pri la ĝenerala nombrado de la ĉina loĝantaro.

La 6-an de januaro, 1984 «Bergens Tidende» de Norvegio publikigis artikolon pri la amo kaj geedziĝo de junaj ĉinaj laboristoj, kiun reverkis nia abonanto Elna Matland laŭ la «Enketo pri amo kaj geedziĝo de junaj laboristoj» de la 11-a numero de EPĈ en 1983.

Krome, «Esperanto», «Heroldo de Esperanto», «Informilo» de Aŭstrio kaj aliaj de tempo al tempo reprenis niajn Esp-novaĵojn.

Ni kore dankas ĉiujn legantojn kaj redakciojn de la gazetoj, kiuj reprenis niajn artikolojn kaj fotojn. Ilia laboro estas utila por konigi Ĉinion al diverslandaj popoloj kaj esperantistoj kaj akceli la amikecon de la popoloj kaj esperantistoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

Por Plibonigi la Loĝkondiĉon de Urbanoj



Parto de la loĝkvartalo Sjibjanmen en Pekino

MANKO de loĝdomoj al urbanejoj estas unu el la urĝe solvendaj problemoj en Ĉinio. En 1977, la enketo pri loĝdomoj en 190 urboj montris, ke la po-kapa loĝeja plankareo estis nur 3.6 kvadrataj metroj, la domoj de ĉ. triono da urbaj familioj estis troloĝataj kaj nemalmultaj gejunuloj ne havis propran loĝejon, kvankam ili jam plenumis la geedziĝan procedon.

En 5 jaroj post 1979, la ŝtato (inkluzive de la centra kaj lokaj registaroj kaj la ŝtataj entreprenoj) konstruis loĝdomojn kun plankareo de 400 milionoj da

kvadrataj metroj, kio rimarkinde plibonigis la loĝkondiĉon de parto de la urbanejoj.

La kaŭzoj pri manko de loĝdomoj estis ĉefe: Unue, pro la subevolua ekonomio la ŝtato ne povas asigni pli grandan monsumon al konstruado de loĝdomoj. Laŭ statistiko, de 1949 ĝis 1978, por konstrui loĝdomojn en urboj kaj urbetoj Ĉinio investis 79 miliardojn da ĵuan-oj (ĉ. 39.5 miliardojn da usonaj dolaroj), la monsumo estis nur 9.7% de la totala investo de la fundamenta konstruado en la sama periodo, per tiu sumo oni konstruis loĝdo-

mojn kun plankareo de 846 milionoj da kvadrataj metroj kaj kun simplaj instalaĵoj ene. Due, tro rapide kreskis la loĝantaro en la urboj kaj urbetoj. En 1949 la nombro de urbanejoj estis pli ol 50 milionoj, sed en 1982, ĝi estis 142 milionoj. La rapideco de la loĝantara kresko multe superis tiun de la loĝdoma konstruado. Kaj plie, la natura kadukiĝo de loĝdomoj ankaŭ estis unu el la kaŭzoj.

Ekde 1979, la popola registaro klopodis limigi la pliiĝon de la urba loĝantaro, kaj samtempe pligrandigis la proporcion de la

investo por la loĝdoma konstruado en la fundamenta konstruado: en 1978 la proporcio estis nur 7.8%, en 1979 14.8% kaj en 1982 25.4%. Nur en la tri jaroj de 1979 ĝis 1981 la plankareo de la konstruitaj loĝdomoj egalas al 50% de tiu de la antaŭaj 29 jaroj post la Liberiĝo, kio solvis la problemon pri loĝdomo por 17 milionoj da urbanoj.

Dum la pasinta tre longa periodo la loĝdoma konstruado de Ĉinio en la urboj kaj urbetoj dependis nur de la ŝtata investo. En la lastaj jaroj la ŝtato komencis disvolvi la aktivecon de la lokaj registaroj kaj entreprenoj kaj praktikis la principon, ke la ŝtato, lokaj registaroj kaj entreprenoj kune faras investadon al la loĝdoma konstruado, tio jam akiris rimarkindan efikon. Laŭ statistiko, en la jaroj de 1979 ĝis 1981 la loĝdoma investo de la lokaj registaroj kaj entreprenoj okupis 64% de la totala investo de loĝdomoj. Krome, la ŝtato praktikas la politikon kuraĝigi kaj helpi individuajn personojn mem konstrui loĝdomojn kaj donas al ili oportunojn en projektado de loĝdomo, livero de tereno kaj materialoj kaj konstruado. De 1980 ĝis 1982 la individuaj personoj de Ĉinio investis 1.37 miliardojn da jŭan-oj kaj konstruis loĝdomojn kun plankareo de 23.62 milionoj da kvadrataj metroj. En la provincoj Ĝjilin, Hejlongĝjang, Anhuĵ, Gŭangdong, Hunan, Henan kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio la loĝdomoj konstruitaj de individuaj personoj en urboj kaj urbetoj jam okupis pli ol 15%, kaj en iuj urboj kaj urbetoj eĉ 40%.

Iuj urboj de Ĉinio faras provadon konstrui vendeblajn loĝdomojn por solvi la problemon de manko de kapitaloj. Laŭ la nuna




Novaj loĝdomoj en Heping-distrikto, Tjanĝin

vivnivelo de la ordinaraj oficistoj kaj laboristoj de Ĉinio, nemultaj civitanoj kapablas aĉeti loĝdomon, sed tia metodo helpas pli riĉajn civitanojn solvi loĝdoman problemon. La popola registaro ankaŭ kuraĝigas ĉinajn elmigrintojn, iliajn enlandajn familianojn, revenintajn ĉinajn elmigrintojn kaj ĉinojn havantajn fremdnaciecajn parencojn kaj amikojn aĉeti aŭ konstrui loĝdomojn per sendita fremda mono. En Ĉinio la loĝdomoj de ĉiuj individuaj personoj estas protektataj de la leĝo.

Dank' al la kuna klopodo de la ŝtato, lokaj registaroj, entreprenoj kaj individuaj personoj, multe rapidis la loĝdoma konstruado en la lastaj jaroj. Ekzemple, en la lastaj 5 jaroj en Pekino oni konstruis loĝdomojn kun plankareo de 20 milionoj da kvadrataj metroj, kiu superis la

totalan plankareon de la loĝdomoj konstruitaj en la antaŭaj 20 jaroj. En Ŝanhajo oni konstruis loĝdomojn kun plankareo de 11 milionoj da kvadrataj metroj en la sama tempo, 1.1 milionoj da loĝantoj transloĝiĝis en tiujn novajn domojn. Krome, oni konstruis 11 domegojn kun plankareo de pli ol 90 000 kvadrataj metroj por altklasaj intelektuloj, altrangaj kadroj, revenintaj ĉinaj elmigrintoj kaj familianoj de ĉinaj elmigrintoj kaj demokratiaj personoj.

En la lastaj jaroj, pli kaj pli multaj urboj praktikis unuecan projektadon por loĝdomoj, kio evidente plibonigis la loĝmedion. Iuj novaj loĝdomoj formis straton aŭ kvartalon, aliaj estas konstruitaj ĉe la rivero kaj lago, ĉiuj kun instalaĵoj komercaj, kulturaj, edukaj, higienaj, servaj kaj



*Nova domo
por loĝantoj de
la monturbeto
Doŭkoŭ de Si-
ĉuan-provinco*

bonstatigaj. Kaj la internaj projektoj de la loĝdomoj estas senĉese novigitaj por laŭeble liveri al la loĝantoj pli komfortajn kaj konvenajn loĝkondiĉojn. En la lastaj 5 jaroj, en Ŝanhajo, Nantong kaj aliaj urboj, la loĝeja plankareo de la nove konstruitaj loĝkvartaloj jam okupis pli ol 40% de tiu de la nove konstruitaj loĝdomoj. En Pekino jam konstruiĝis pli ol 50 novaj loĝkvartaloj. En la loĝkvartalo Ĝinsong sudoriente de Pekino, kiu estis maldense loĝata, jam konstruiĝis pli ol 100 novaj etaĝdomoj, kiuj formis novan urbeton kun 50 000 loĝantoj. En la du loĝkvartaloj Ĉingtan kaj Bejhŭan de la urbo Ĉangĝoŭ en Ĝjangsu-provinco, oni konstruis sur placetoj

artefaritajn montetojn kaj lage-tojn, starigis skulptaĵojn, plantis florojn, herbojn kaj arbojn, kio faris la kvartalojn des pli belaj kaj kvietaj. En la loĝkvartalo

Ĉunliŭ de la urbo Daljan de Ljaŭning-provinco, oni plantis himalajajn cedrojn, plorsalikojn, diversajn florojn kaj herbojn kaj ankaŭ instalas trapezojn, svingboatojn kaj sidglitejojn por infanoj.

En Ĉinio la lupago de urbaj loĝdomoj estas malalta kaj stabila. Ekzemple, en Pekino la monata lupago por ĉiu kvadrata metro estas 0.16 jŭan-o. Se ĉiu paro da geedzoj monate enspezas meznombre salajron de 110 jŭanoj (en Ĉinio plejparto de la virinoj havas laboron), la monata pago por unu apartamento kun plankareo de 25 kvadrataj metroj estas 4 jŭanoj, kiuj okupas nur 4% de ilia enspezo.

Kvankam nun pli aŭ malpli boniĝis la loĝkondiĉo de la urbanoj en Ĉinio, tamen ankoraŭ multaj urbanoj loĝas en tre malvastaj loĝejoj pro ĝia loĝantara tromulteco, por radikale solvi la problemon, oni devas klopodi dek aŭ dudek jarojn.

Krom uzi enlandajn ĉiuflankajn fortojn, la ĉina registaro intencas ankaŭ enkonduki el aliaj landoj avangardajn teknikojn kaj instalaĵojn de la konstrua industrio, por fari grandskalan konstruadon de loĝdomoj en la urboj kaj urbetoj.



*Florflorado
sur balkono*

NOVAJ SUKCESOJ EN LA ENERZIA EKSPLUATADO DE ĈINIO

La energia ekspluatado de Ĉinio akiris grandajn sukcesojn en 1985.

En la pasinta jaro Ĉinio finkonstruis aron da oleaj kaj gasaj putoj en la malnovaj olekampoj Daĉing, Ljaŭhe, Ŝengli, Ĝongjŭan, Hŭabej kaj Dagang, kun la totala borita longeco de 7 940 000 metroj, dank' al kio la produktokapablo de nafto pliiĝis je 8 108 500 tunoj, kaj tiu de gaso je ĉ. 300 milionoj da kubmetroj. Kaj nove trovita olekonservo ekspluatebla atingis 500 milionojn da tunoj.

La produktokapablo de la ĉina karboindustrio pligrandiĝis je 16 980 000 tunoj. En la karbo-mankaj Nordoriento, Oriento kaj Sudo de Ĉinio, komencis produkti 14 paroj da novaj ŝaktoj grandaj kaj mezgrandaj, kun produktokapablo de 10 840 000 tunoj, t.e., 71 procentoj de la totala nove aldona produktokapablo.

En la provincoj Hubej, Ĝjilin, Hejlongĝjang, Ljaŭning, Hebej kaj Ĝeĝjang de Ĉinio finkonstruiĝis 25 grandaj kaj mezgrandaj elektrejoj, kiuj pliiĝis elektran produktokapablon je 4 145 900 kilovattoj kaj per tio oni superplenumis la planon de la elektra konstruado je 22%, kun pliiĝo de 1 550 000 kilovattoj kompare kun tiu de 1982.

LA PLEJ LONGA FERVOJA PONTO SUPER LA FLAVA RIVERO EN KONSTRUADO

La plej longa ponto super la Flava Rivero de Ĉinio estas konstruata. Ĝi situas ĉe la limo de la provincoj Henan kaj Ŝandong kaj longas je 10 280 metroj, t.e., 3 500 metrojn pli longa ol la Nankina Pontego super Jangzi-rivero. La

ponto estos finkonstruita en la fino de 1985.

KAMPARANOJ MENDAS AEROPLANOJN

La kamparanoj de Liŭĝŭang-vilaĝo de Ŝinŝjang-gubernio, Henan-provinco, aĉetis unu aeroplanon je la prezo de 20 000 jŭanoj (10 000 usonaj dolaroj) per la komuna fonduso. Tio, ke kamparanoj faris tian aĉeton, estas senprecedenca en la historio de Ĉinio.

Liŭĝŭang-vilaĝo havas pli ol 1 000 loĝantojn. En la pasinta jaro la vilaĝo enspezis 4 milionojn da jŭanoj kaj la popersona enspezo atingis ĉ. 1 000 jŭanojn. La publika akumulado atingis 6.6 milionojn da jŭanoj.

Ili aĉetis mini-aeroplanon "Abelo n-ro 3". La aeroplano estas uzata por ŝpruci insekticidon sur rizkampojn kaj kotonkampojn, sterki la kampojn kaj semi arbojn kaj herbojn.

La novaĵo vekis grandan intereseon ĉe kamparanoj de multaj lokoj. Ankaŭ ili deziris mendi por si aeroplanojn. Dum la tempo de septembro 1983 ĝis marto 1984 kamparanoj jam mendis 16 tiajn agrikulturajn aeroplanojn de multaj funkcioj kaj malalta prezo.

ĈINIO HAVAS PLI OL CENT REZERVEJOJN

Nun en Ĉinio jam stariĝis 106 rezervejoj, kie estas bone protektataj multaj raraj birdoj, bestoj kaj vegetaĵoj.

En la vasta Ŝingĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono oni difinis ok rezervejojn en la lastaj tri jaroj por protekti la rarajn sovaĝajn azenojn kaj kamelojn proprajn ekskluzive al la regiono.

En la regiono de Ljangŝan-montaro de Siĉŭan-provinco ĝis la suda deklivo de Ĉinling-montaro de Ŝenŝji-provinco troviĝas dekkelkaj rezervejoj por protekti la pandojn.

En la Nordoriento kaj Oriento de Ĉinio oni jam difinis kelkajn marĉejojn kiel rezervejojn, por ke la ruĝ-vertaj grupoj travintru kaj generu idojn.

PLI OL 500 MUZEOJ EN ĈINIO

Nun la muzeologia afero de Ĉinio jam havas sian rudimenton, kaj la totala nombro de muzeoj superis 500, 20-oble pli granda ol tiu en la unuaj kvindekaj jaroj. Duono de la urboj en la lando jam havas muzeojn, kiuj akceptas ĉiujare kelkdek milionojn da vizitantoj ĉinaj kaj eksterlandaj.

LA ĈINA KRIPLULA FONDUSO FONDITA

La 15-an de marto ĉi-jare fondiĝis la nomita fonduso. Post sia fondiĝo ĝi unue starigos en Pekino Resanigan Esplor-Centron de membro-kripluloj kaj faros aliajn bonstatigajn aferojn. Ĝi klopodos ankaŭ por akceli amikajn kontaktojn kun eksterlandaj kriplulaj organizoj.

En Ĉinio nun troviĝas 1.6 milionoj da blinduloj, 3 milionoj da surdamutuloj kaj 3 milionoj da membro-kripluloj.


La ĉina registaro donis grandan atenton al la bonstatigaj aferoj por la kripluloj. La jam starigitaj organizoj estas: la Ĉina Blindula kaj Surdamutula Asocio kaj la Ĉina Sporta Asocio de Kripluloj.

23 ĈINAJ FILMOJ PREMIITAJ EN LA INTERNACIAJ FILMAJ FESTIVALOJ

En 1983 23 ĉinaj filmoj ricevis premiojn en 11 internaciaj filmaj festivaloj. «La Paseo en Suda Urbo-kvartalo» en lirika stilo prezentas al spektantoj bildon de maldolĉeta vivo de malriĉaj urbanoj en la malnova Ĉinio. La filmo ricevis premion de "Ora Aglo", la plej alta premio por rakont-filmo, en la Dua Manila Interna-

(daŭrigo sur p. 49)

VERDA URBO



*Verdigita loko ĉe la Nankina
Pontego super Jangzi-rivero*

EN la frua somero de la pasinta jaro mi vizitis la urbon Nankino. Iutage mi kun granda plezuro ascendis la Maŭzoleon de Sun Jatsen oriente ekster la urbo. Antaŭ miaj okuloj prezentigis verda maro. Se mi ne vidus la altajn domojn superstarantajn arbojn, mi neniel povus imagi, ke tie kuŝas urbo kun 1.33 milionoj da loĝantoj.

Nankino estas la ĉefurbo de Ĝjangsu-provinco. Ĝi estis unu el la antikvaj ĉefurboj de Ĉinio, kaj nun jam fariĝis moderna prospera urbo. Ĝi estas verda urbo fama tra la tuta lando. Nun la urbo havas verdan areon de 5 079 hektaroj, t.e. 3.5 kvadrataj metroj por ĉiu urbano. La urbo ĉiujare elspezis 400 000 jŭanojn (200 000 usonajn dolarojn) por verdigado. Tamen, la urbo iris zigzagan vojon en la arbokultura historio. En la antikveco la mon-

to de la nuna Maŭzoleo de Sun Jatsen estis kovrita de densaj arboj, kaj poste ĝi preskaŭ kalviĝis pro pluraj militoj. En la 14-a jarcento p. K. Ming-dinastio prenis Nankinon kiel sian ĉefurbon kaj komencis arbarizi ĝin kaj malpermesis senbridan hakadon. Tiam reaperis la antaŭa aspekto. Sed en la 17-a kaj 18-a jarcentoj, t.e. en la periodo de Ĉing-dinastio, la monto ree kalviĝis. En la jaro 1929 estis finkonstruita la Maŭzoleo de Sun Jatsen, la granda pioniro de la Demokratia Revolucio de Ĉinio, oni rekomencis arbarizi la monton. Kaj en la postaj jaroj, kvankam la arboj estis detruitaj en malsama grado, tamen la monto restis fundamente kun sia antaŭa fizionomio. Nun la maŭzoleo kun areo de 2 900 hektaroj havas ja 2 100 hektarojn da arb-

kampoj. La maŭzoleo nun servas al publiko kiel pitoreskejo.

Irante en la urbo, oni ĉiam sentas agrablan freŝecon. La arboj ambaŭflanke de larĝaj asfaltitaj stratoj formas longajn verdajn koridorojn. Sur stratoj en la urbo kreskas malsamspecaj arboj, tial oni ŝatas nomi straton per arbonomo, ekz., "Platano-strato", "Ume-strato", "Strato de Himalaja Cedro". Nur tiuj belaj nomoj jam bildigis tiun ĉarman urbon.

Platanoj estas ĉefaj arboj ambaŭflanke de stratoj en Nankino. La strato Jatsen en la urbocentro havas alian nomon "Platano-strato". La platanoj disetendas kaj intermiksas siajn folio-densajn branĉojn, kiuj supre ŝirmas la tutan straton. La platanoj ĝuigas al la urbanoj agrablajn ombre-



Cedroj ambaŭflanke de strato en Nankino

jojn, cetere ili havas fortan vivipovon kaj povas rapide kreski eĉ en malbona grundo.

La alia speco de la apudstrataj arboj en la urbo estas rara himalaja cedro. Ĝi impone kaj ĉiamverde staras kun rekta trunko kaj horizontale disetendiĝantaj branĉoj. Pro tio la nankinanoj aparte ŝatas ĝin. Lastatempe la popola registaro de Nankino honoris la cedron kiel la urban arbon. Nun Nankino fariĝas ĉefa kulturejo de himalaja cedro en Ĉinio.

En la komenco post la Liberiĝo troviĝis en la urbo nur pli ol 2 000 apudstrataj arboj, sed nun ili jam superis 200 000. Tio estas fiero de la nankinanoj. En la urbo pompas floroj printempe, ombriĝas stratoj somere, maturiĝas fruktoj aŭtune kaj videblas verdaĵoj vintre. En varma somero oni multe profitas de la densa arbombro. La temperaturo de la


stratoj ombrataj de arboj estas 3° C malpli alta ol tiu de lokoj sen arboj, kaj la aera humideco de la antaŭaj pli alta je 10-20% ol tiu de la lastaj. Krome, la verdaĵoj povas redukti la intensecon de bruo.

Nankino estis ĉefurbo de ok dinastioj en la historio, tial ĝi havas multajn historiajn lokojn, objektojn kaj pitoreskejojn. Lerte kunligi avenuojn kaj la pitoreskejojn estas grava trajto de la urbo en verdigado. En gajaj festotagoj oni povas apreci florojn en la parko de Moĉoŭ-lago kaj remi en la parko de Ŝĵuan'ulago; matene kaj vespere oni povas promeni kaj fari korpan ekzercadon ĉe gazonoj antaŭ siaj domoj.

La apudstrataj gazonoj bone servas al la urbanoj, precipe al la emeritoj kaj infanoj. Apud la Orienta Strato Pekino konstru-

iĝis antaŭ nelonge gazono ĉe la rivereto Perlo. Tie staras verda ekrano el vico da ileksoj (*Ilex chinensis*) kaj vicoj da altaj hikorioj (*carya cathayensis*) kaj larĝfoliaj poploj. Tiu kvieta gazono pli ol 100 metrojn longa apud la vicleplena strato estas bona ripozejo por maljunuloj kaj librolega loko por gejunuloj.

Krom verdigi diversajn pitoreskejojn kaj stratojn, la arbokultura administracio de la urbo donis grandan atenton al verdigado de fabrikoj, institucioj, lernejoj kaj loĝkvartaloj. Surbaze de tio Nankino havas relative racian verdigan sistemon. Verdigado de fabrikoj havas grandan signifon por preventi median polucion. La Nankina Plastaĵ-fabrika estas entrepreno simila al ĝardeno. En la fabriko videblas vicoj da arboj, ĉarmas florbedoj kaj herboj, kiuj kovras 90.9% de ĝia



Verdigita loko de fabriko


instalaĵoj aŭ en produktado per kolora ŝanĝiĝo de arabaj folioj.

La bela medio donas pli da plezuro al la loĝantoj. Iu maljunulino, kiu loĝas en la nova loĝkvartalo Ĵujĝin, diris al mi: “Antaŭe ni ne volis loĝi ĉi tie, sed nun ni ne volas forlasi la lokon.” Tiu kvartalo havas 55 etaĝdomojn kun pli ol 2 000 familioj. En la mezo de la kvartalo estas parketo kun diversaj floroj. Ili de tempo al tempo odoras agrable. Estas tre ĉarme, ke sur la balkono de ĉiu familio estas florbazonoj. Rigardate de malproksime, ili estas kvazaŭ florkorboj en la aero, kiuj formas vertikalan ĝardenon.

Nun mi komprenis, kial la maljunulino ne volas forlasi sian nunan loĝejon. Eĉ mi, turisto el alia urbo, forlasis la urbon kun bedaŭro.

totala areo. Oni diris al mi, ke la laboristoj ameme nomas la arbojn, florojn kaj herbojn verdaj gardistoj, ĉar ili havas fortan senson al la aera polucio. Kelkfoje oni trovis perturbiĝon de

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO




1. Pekino
2. Nankino
3. Huhhot
4. Ŝanhajo
5. Ĉangĉun
6. Koko-monto
7. Henan-provinco
8. Ŝandong-provinco
9. Pujang-gubernio
10. Longde-gubernio
11. Kajfeng
12. Hangĝoŭ

PETROL-KEMIA URBO JANŜAN APUD PEKINO

La Janŝan-a Ĝenerala Kompanio de Petrol-kemia Industrio sudokcidente de Pekino estas la plej granda kombinato de petrol-kemia industrio en Ĉinio. Ĝi okupas areon de 36 kvadrataj kilometroj kaj posedas ses kemi-industriajn fabrikojn kaj unu petrol-rafinan fabrikon, kiuj estas ekipitaj per 42 kompletoj da modernaj petrol-rafinaj kaj kemi-industriaj instalaĵoj. Ĝi ĉiujare produktas pli ol 170 specojn da oleoj kaj kemiaĵoj kaj provizas pli ol 1 600 entreprenojn de Ĉinio per siaj produktaĵoj. Depost sia fondiĝo en la komenco de la sepdekaj jaroj, ĝi gajnis profiton pli multan je trioblo ol la investita monsumo.

Janŝan estas unu el la ĉefaj industriaj satelitaj urboj konstruataj de Pekino. En la urbo troviĝas produktaj, projektaj, scienco-esploraj, konstruaj, instalaj kaj administraj entreprenoj de la nomita kompanio, alte staras petrol-rafinaj instalaĵoj kaj interkruciĝas ole-transportaj tuboj vicon post vico. La urbo ĉiujare konstruis pli ol 1 500 apartamentojn. Oni tie jam konstruis naĝ-basenojn, sportejon, bibliotekon, parkon kaj teatron. Tiu urbo estas en vigla disvolviĝo.

Fotoj de SUN JI



La centra aŭtomata regaĵejo de la fabriko Ĉjanĝin

La Kemi-industria Fabriko Ĉjanĝin en nokto






Petrol-rafinaj turoj

Veldisto


La kompanio fondis oficistan kaj laboristan lernejon kaj postlaborajn teknikajn kursojn por altigi la klarecon kaj teknikan nivelon de la laboristoj. La foto montras laboristojn en lernado.




Loĝdomoj



Ŝnur-tirado







Turo en muntado



Infana ludejo





Konstruantoj 70 metrojn super la tero

PLENE PROFITIGI PRODUKTIVECON DE ESPERANTA VORTFARADO

I. PRODUKTIVO DE ESPERANTAJ VORTOJ

La Esperanta vortaro konsistas el la fundamentaj kaj ordinaraj vortoj.

La fundamentaj vortoj estas la plej primara, plej grava kaj plej stabila parto de la Esperanta vortaro. Ekz.:

1. vortoj pri la naturo: ĉielo, tero, monto, rivero, suno, luno, herbo, arbo, vento, pluvo, tondro, fulmo ktp;

2. vortoj pri la homa korpo: kapo, cerbo, koro, okulo, mano, piedo ktp;

3. vortoj pri la instrumentoj kaj produktaj viv-rimedo: greno, oleo, viando, legomo, ĉevalo, bovo, ŝafo, koko ktp;

4. vortoj pri agoj: manĝi, trinki, veni, iri, kuri, pensi, rigardi, paroli, skribi ktp;

5. vortoj pri la eco kaj stato de objektoj: granda, longa, bona, peza, ruĝa, blanka ktp;

6. numeralo: unu, du, tri ... cent ... miliono ktp.

Krom la fundamentaj, ĉiuj aliaj estas vortoj ordinaraj. Ilia nombro estas multe pli granda ol tiu de la fundamentaj, kies plejparto, precipe la substantivoj, verboj kaj adjektivoj, estas multe produktivaj.

Ni prenu la vorton "koko" kiel ekzemplon. En Esperanto troviĝas la baza radiko "kok-", sed oni povas per ĝi produkti jenajn derivaĵojn: virkoko, kokino, kokido, kokejo, kokaĵo, kokovo, kokokrio ktp.

En la jaro 1887, kiam d-ro Zamenhof publikigis la "Unuan Libron", Esperanto havis nur 918 bazajn vortradikojn. Dank' al ilia produktivo Esperanto, de la komenco, jam fariĝis lingvo kun forta vivipovo. Ĝi servas ne nur kiel buŝa lingvo en la interkomunikado, sed ankaŭ kiel literatura lingvo en verkado de poemoj, romanoj kaj tradukado de mondfamaj verkoj. En la "Uni-

versala Vortaro de Lingvo Internacia Esperanto" estas enmetitaj 2 653 vortradikoj. Laŭ statistiko, per tiuj vortradikoj oni jam povas produkti 50 000-60 000 vortojn.

II. EDIFO DE LA VORTFARADO DE HAN-LINGVO

Pri la simileco kaj malsameco inter la Esperanta kaj han-lingva vortfaradoj mi faris komparadon en mia artikolo "Vortfaradoj de Esperanto kaj la Ĉina Lingvo" en la numero 9, 1982, tial mi ne volas doni plu vortojn. Ĉi tie mi volas fari unuapaŝajn komparadon kaj esploradon de la du lingvoj, nur koncerne la produktivon de la fundamentaj vortoj.

En la komenco de la teksto mi jam listigis nombron da vortoj, kiuj estas fundamentaj ne nur por Esperanto sed ankaŭ por han-lingvo. Sed tiuj vortoj en han-lingvo povas produkti pli multe da vortoj ol tiuj de Esperanto.

En 1982 la Eldonejo de la Ĉina Popola Universitato eldonis la "Komunuzaj Kunmetitaj Vortoj". Tiu vortaro estis iniciatita de ĝia direktoro U Juĝang, fervora subtenanto de Esperanto, kaj plenumita de aliaj post multjara laborado. En ĝi estas kolektitaj ĉ. 90 000 vortoj, kiujn produktis 3 994 radikoj. Ĉiu radiko faris meznombro 22 ofte uzatajn vortojn.

Kompreneble, oni ne devas veni al tia konkludo, ke iu ajn radiko en han-lingvo povas produkti pli multe da vortoj ol Esperanta radiko. Sed, en la komparado oni trovas ion saman en vortfarado de la du lingvoj.

Kiam oni enkondukas novajn vortojn, ili faras plejebilon kunmeti ilin sur la bazo de la malnovaj. La ĉina ideografiaĵo "电" (elektro) ekzistas jam en la antikveco, sed la vorto "电车" (tramo) aperis nur en la moderna epoko. Ĉinoj ne donis al ĝi iun fremdan nomon, sed simple kunmetis la vorton "电车" (tramo) per la du malnovaj ideografiaĵoj "电" (elektro) kaj "车" (veturilo).

Malsame al la Esperantaj vortoj “kurento” (电流), “cirkvito” (电路) kaj “telefono” (电话), la ekvivalentaj vortoj de han-lingvo estas: “电” (elektro)+“流” (fluo), “电” (elektro)+“路” (elektro) +“电” (vojo) kaj “话” (parolo). Sammaniere formiĝas ankaŭ la jenaj vortoj: pilo (“电池” elektro+ujo), tensio (“电压” elektro+premo), lifto (“电梯” elektro+ŝtuparo), bakelito (“电木” elektro+ligno), elektrolizi (“电解” elektro+malkombino) ktp.

El tiuj fundamentaj vortoj oni povas fari multajn novajn vortojn, ankaŭ el kiuj povas naskiĝi aliaj novaj vortoj.

La vortoj “kurento”, “cirkvito” kaj “telefono” estas tre konataj por la eŭropanoj. Ĉu enhan-lingvo tiel kunmeti la vortojn “elektro+fluo” (电流), “elektro+vojo” (电路) kaj “elektro+parolo” (电话) estas absurde?

Bonvolu legi la klarigojn de tiuj vortoj en la “Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto”:

kurento: fluo de elektro pasanta tra konduktilo;

cirkvito: la vojo laŭ kiu kurento povas cirkuli. . .

telefono: aparato, . . . kiu ebligas interparoladon je distanco;

tramo: elektra veturilo.

Estas evidente, ke fremdlandanoj inkluzive de la plejparto de eŭropanoj posedantaj lingvojn de la hindeŭropa familio ne malfacile komprenas la vortfaradon de han-lingvo, se ili konas la karakterojn de vortfaradoj de han-lingvo kaj Esperanto.

Iuj eksterlandaj amikoj jam aplikas tian vortfaradon en praktikado. En sia interesa libro “Sekreto de Marestaĵoj” jugoslava esperantisto Marinko Ĝivoje ne unufoje uzis “elektra fluo” (p. 74-75).

La vorto “tohuo” (toŭfuo) jam estas enmetita en PIV, sed mi prefere anstataŭigas ĝin per “fabkazeo”. La revuo “Esperanto” de la Universala Esperanto-Asocio publikigis artikolon en sia sesa numero, 1983, kiu proponas uzi la vorton “fabkazeo”. Fab- kaj kaze- estas fundamentaj vortradikoj. Kion signifas tiu kunmetita vorto, neniu povas miskompreni.

Multaj fremdaj vortoj povas esti ekvivalente ĉinigitaj laŭ la dirita maniero. Ĉu oni ne povas esperantigi ilin laŭ la maniero?

III. PLENE PROFITIGI PRODUKTIVECON DE ESPERANTA VORTFARADO

Esperantistoj devas plene utiligi la disponeblajn vortfarajn materialojn kaj plene disvolvi la produktivecon de fundamentaj vortradikoj en vortfarado. Tio devas fariĝi principo atentinda precipe por gvidantoj de Esperanto-kurso, kompilantoj de vortaro kaj lernolibro, verkantoj de facilaj legaĵoj kaj Esperantaj laborantoj.

Esperanto estas la dua lingvo, kiun oni lernas ne kiel la nacian lingvon denaske, sed duonvoje. Oni plejparte lernas Esperanton en libera tempo. Krome ilia tempo por tio ne estas multa. Lerno de Esperanto estu por ili ne balasto, sed plezuro. Pri tio samopinias kun mi multaj Esperantaj laborantoj buŝe, sed neglektas praktike kaj almenaŭ ne donas al tio sufiĉan atenton. Ni devas bone koni, ke ĉiam defendi la simplecon kaj facilecon de Esperanto ĉu en teorio aŭ en praktiko estas grava problemo koncerne la perspektivon de Esperanto.

Posedi Esperantajn vortojn estas pli malfacile por la homoj apartenantaj al la ne-hindeŭropa lingva familio, ĉar tiuj vortoj estas tute fremdaj por ili. La Esperantaj vortoj eĉ fortimigas komencantojn en Azio kaj Afriko. Ne ĉiuj kiel Tols-toj rapide lernis Esperanton nur en du horoj. La vortoj ofte uzataj de hungaroj, finlandanoj, maltanoj kaj estonoj estas tute malsamaj al tiuj de Esperanto.

Internacie, pli kaj pli multaj malproksimvidaj personoj timas, ke la Esperanto-vortaro dikiĝas tagon post tago. Ili opinias, ke tio estas unu el la kialoj, pro kio la komencantoj forlasis sian lernon de nia lingvo jam komencitan. Oni devas konfesi, ke la dika vortaro de Esperanto spegulas la evoluon de la homa socio kaj riĉiĝon de la lingvo mem. Tio mem estas bona afero. Sed aliflanke, la novaj vortoj aperantaj unuj post aliaj estas tute fremdaj kaj vere kapdolorigaj por komencantoj. Tial, plene elfosi la produktivecon de fundamentaj vortradikoj kaj uzi la disponeblajn vortojn por esprimi novajn ideojn helpas al la solvo de tiu kontraŭdiro.

Laŭ la analogia rezonado, ĉu oni forigas la malfacile memoreblajn vortojn kiaj kurento kaj cirkvito el la vortaro? Ŝajne jes. Sed, fakte ne. Tiuj vortoj devenis de la hindeŭropa lingva familio kaj estas longtempe uzataj en Esperanto kaj havas sian bazon precipe en Eŭropo, la hejmloko

Pri la transskribo de ĉinaj personaj kaj geografiaj nomoj

Karaj legantoj,

Post la ekuzo de la hanlingva latiniga sistemo en transskribo de ĉinaj personaj kaj geografiaj nomoj en nia gazeto en aprilo de 1979, iuj legantoj skribis al ni, ke la nomoj kun neesperantaj literoj kiel Q W X Y estas neprononceblaj por ili kaj petis, ke ni esperantigu la ĉinajn proprajn nomojn. Akirinte konsenton de koncerna instanco, ni decidis uzi, ekde tiu ĉi numero, nur Esperantajn literojn en transskribo de la ĉinaj propraj nomoj.

Ĉar la Esperanta fonemaro multe diferencas de la hanlingva kaj estas absolute neeble ĝuste esperantigi la ĉinajn proprajn nomojn laŭ sono, ni devas fari certan kompromison. Konsiderante ke antaŭe oni iom tro emfazis la plaĉecon de la esperantigitaj nomoj en formo, oferante la similecon en sono, ni faris racian modifon al la malnova projekto. Ekzemple, antaŭe ni transskribis diftongojn de ĉinaj vortoj senŝanĝe, rezulte de kio iuj nomoj dusilabaj fariĝis trisilabaj aŭ kvarsilabaj. La nova sistemo sekvas la

principon transskribi la silabojn sen pliigo de ilia nombro. Tamen iuj problemoj ankorau restas nesolvitaj. Ekzemple, en la hana lingvo troviĝas ne la voĉaj konsonantoj B D G, tamen ekzistas elspiraj kaj neelspiraj P T K. La elspirajn P T K ni transskribas per la Esperantaj P T K kaj la neelspirajn per B D G. En la hana lingvo abundas Ĥ, tamen ne ekzistas H. Pro tio ke la Esperanta litero Ĥ tendencas al reduktiĝo, ni uzas H anstataŭ Ĥ en la transskribado.

Hodiaŭ multaj geografiaj kaj personaj nomoj latinliteraj estas uzataj senŝanĝe en Esperantaj periodaĵoj, ankaŭ EPĈ ne povas esti escepto. Kredeble longa tempo pasos antaŭ ĝenerala esperantigo de la propraj nomoj. Ankaŭ nia nova transskriba sistemo por transskribo de ĉinaj personaj kaj geografiaj nomoj ne estas perfekta, nek definitiva. Por eviti miskomprenon, ni donos parenteze la oficialajn formojn de ĉinaj propraj nomoj latinigitaj laŭ la hanlingva latiniga projekto, se estos necese.

La Redakcio

de Esperanto. Ni ne devas kaj ankaŭ ne povas ŝanceli tiun bazon. Sed, ni povas iri per la du piedoj. Tiuj kunmetitaj vortoj, kiuj havas la saman sencon de kurento kaj cirkvito, devas esti rajtigitaj daŭre ekzisti kaj disvolviĝi. Kiun vorton el la du specoj konservi aŭ forigi estos juĝite kaj decidite de la uzantoj en la longa lingva evoluado.

En la kampoj de la estontaj scienco, tekniko kaj socivivo certe aperos senĉese novaj aferoj. Por esprimi ilin, krom transpreni la vortradikojn el la naciaj lingvoj (ĉefe la lingvoj de la hindeŭropa familio), ĉu oni povos kunmeti novajn vortojn sur la bazo de la disponeblaj vortoj? Ĉu la vorto "lasero" ne povas esti kunmetita per stimul +radio? En PIV oni klarigas, ke tiu vorto konsistas el la komencoliteroj de "Lum-Ampliflo per Stimulata Eligo de Radioj". Sekve la kunmetita vorto "stimulradio" havas sian bazon.

Iuj opinias, ke la kunmetitaj vortoj estas tro pezaj. Jes. Sed, tio ne gravas! Iuj tro pezaj kunmetitaj vortoj povos malaperi el la vortaro post certatempa provuzado. Kaj aliaj eble estos mallongigitaj. Tio estas ofte renkontata en Esperanto. Ekz., aŭtomobil — aŭt-, fotograf- — fot-, relegaci- — rileg-. Tiaj vortoj ofte formiĝas afereze, apokope kaj sinkope. Se oni povas tiel krei la vortojn, ĉu la vorto "stimulradio" ne povos esti anstataŭigita per "SR" en la estonteco? Uzata kiel la oficiala vorto, "SR" certe produktos serion da novaj vortoj, ekz., SR-tranĉado, SR-armilo kaj SR-terapio. Kompreneble, SR estas nur supozajo. Oni eble agnoskos ĝin, eble ne. Malgraŭ tio, la lingvouzantoj ne toleras esti katenataj de pezaj longaj vortformoj. En praktikado oni certe kreas novajn taŭgajn vortojn en formo simpla kaj logika.

OK SEMAJNOJ EN ĈINIO

de LUDOVIKO ENIZAN (Francio)

ANTAŬ multaj jardekoj, kiam mi estis infano kaj aŭdis pri Ĉinio, mi ne sciis ekzakte, ĉu tiu lando estas legenda aŭ reala. Jam de longe mi scias, kaj dank' al "El Popola Ĉinio" mi eĉ konas iom Ĉinion. Sed ju pli da scioj mi akiris, des pli postulema estis mia deziro ĝin viziti, kaj fine konatiĝis kun ĝia popolo.

Longa estis la atendado ĝis la 6a de julio 1983, kiam mia edzino, kiu restadis jam du monatojn en la ĉefurbo Pekino en 1982, kaj mi ekflugis al tiu urbo per la ĉina aviada kompanio CAAC.

Tre agrabla flugado; afablaj geoficistoj zorgis pri nia komforto kaj ni alteriĝis en Pekino, tute viglaj, frumatene.

En la aerodromo nenia teda kontrolado ĉe la dogano; minimuma esploro de la pasportoj kaj vizoj, kaj jen, ni jam premis la manojn de la du ĉarmaj samideaninoj, kiuj, per aŭtomobilo, akompanis nin al nia duĉambra apartamento en kiu ni loĝis kvin noktojn. Dum la tagoj estis vizitoj diversloke. Neniun ĝardenon, parkon, muzeon, palacon, templon, pagodon preterlasis niaj bonaj gegvidantoj. Al la Granda Muro ni pilgrimis grupe kaj poste al la maŭzoleoj, sed intertempe okazis la granda tagmanĝo sur herbejo. Neforgesebla subĉiela festeno.

Ĉion, absolute ĉion, laŭ nia absoluta konvinko, ni estis vizitintaj, kiam amikoj akompanis

nin al la aviadilejo la 12an de julio, por flugi al Ŝanhajo.

Fluginte du horojn, ni estis en Ŝanhajo. Kaj kia surprizo! Tabulo anoncis: "Bonvenon al gesoj L. kaj Z." Ni tuj komprenis: Pekino sendis mesaĝon kaj Ŝanhajo mesaĝistojn.

Du gravajn renkontiĝojn kun la geesperantistoj de Ŝanhajo ni ne povas ne menci: unue la viziton al la fama ĝardeno Jujŭan (mi nomus ĝin muzeo) kaj la solenan vespermanĝon kun la direktoro, en luksa salono de unu el tiuj belegaj pavilonoj; due, laŭorde, la grandan kunvenon organizitan en la Akademio de Sociaj Sciencoj, sub la alta prezido de nia estimata samideano Profesoro Pandiŝo. Ĝin ĉeestis du cent ĉeestantoj kaj plejparte junaj.

Grandaj solenaĵoj je kiuj ni ne kutimas; sed multe agrablas vidi, kiel evoluas Esperanto en Ĉinio. Tute trafe kaj prave la Universala Kongreso en Budapeŝto honoris la Ĉinan Esperanto-Ligon per pokalo.

Post kvar-semajna restado en la universitato Fudan, kie mia edzino perfektigis en la ĉina lingvo, ni daŭrigis nian vojaĝon al sudo. Ni ne forgesu niajn ekskursojn al Uŝji kaj Suĝoŭ, kiuj lasis tre bonajn impresojn al ni, sed ne eblas ĉion priskribi.

Hangĝoŭ ni atingis post trihora veturado per trajno. Tiu urbo kaj ties regiono estas edeno. La Okcidenta Lago kaj ĝiaj vas-

taj areoj da lotusoj vekis la admiron de la plej obtuzaj apatiuloj.

Nia bedaŭro forlasi Hangĝoŭ malaperis nur kiam ni ekvidis Gujĵlin kaj la famajn montpintojn.

Gŭangĝoŭ (Kantono) estis la tria etapo, kaj Kunming la kvara. Multon ni povus rakonti, sed ne ĉion.

Kelkaj francoj jam vizitis Ĉinion, sed malmultaj. Pro tio ni estis iom superŝutitaj per multaspektaj demandoj de diversaj personoj. Ni donos niajn modestajn impresojn, kaj nur niajn.

Ekzemple, kiam oni promenas en urbo, en iu ajn, oni trairas modernajn kvartalojn kun larĝaj stratoj konsistantaj el trotuaro por piedirantoj, flanka ŝoseo por bicikloj kaj meze vasta vojo por la aŭtomobiloj. Grandaj konstruaĵoj bordas tiujn arteriojn. Tio estas tute nova. Apude, povas esti stratetoj en malbona stato, kaj dometoj el tero, tute kadukaj. Estas restaĵo de la malnova urbo, kiun ankoraŭ ne forviŝis la skrapmaŝinoj. Sed la minaco estas proksima; se oni levas la kapon kaj rigardas iom transen, oni vidas grupojn moviĝantajn en la firmamento, kaj baldaŭ aperos grandaj domoj. Jen kaj jen, jam estas amasegoj da ruĝaj brikoj, kiuj atendas enmurigadon. Diversaj maŝinoj, pioĉoj kaj ŝoveliloj fosas por enterigi la tute pretajn tubojn ĉiudimensiajn, cementajn, metalajn, plastajn. Notinde estas, ke sur tiuj konstruejoj oni laboras tage kaj nokte.

La turistoj de la jaro 2 000, verŝajne, nenion plu vidos el tiuj laboroj, kaj nenion komprenos el la energio elĉerpita por tiu giganta laboro, verko. Eĉ hodiaŭ estas vizitantoj, kiuj ne komprenas kial ĉio ne estas jam modernigita.

Por tiuj personoj necesas re-diri, ke Ĉinio eliris el la mez-epoko nur antaŭ kelkaj jardekoj. La malnova reĝimo postlasis multajn belegajn palacojn, kaj mizerajn domaĉojn. La nova Ĉinio celas konservi la unuajn kaj forviŝi la duajn. Vasta plano, konstruado de loĝejoj por miliardo da individuoj, hodiaŭ konsiderataj kiel homoj.

Kaj la ĉinoj? Kiaj ili estas? Kiel ili vivas?

Estas jam dirite, ke la ĉinoj estas multnombraj: belaj kaj junaj, mi aldonas. Mi ne konas la mezaĝajn ĉinojn, sed la maljunuloj certe estas la malplimulto. Male svarmas gejunuloj, kiuj estas belaj, tio estas sendifekta; kripluloj preskaŭ ne videblas. Ĉiuj estas seriozaj kaj afablaj. Surstrate la trafiko estas tre den-

sa: la aŭtobusoj sin sekvas je kelkaj minutoj, ĉiam plenplenaj; biciklantoj nenombreblaj sin ŝovas kiel eble inter la veturiloj kaj piederantoj; ĉiu funkciigas sian signalon sen granda efiko. Tre malofte kolizioj kaj eble neniam kvereloj.

Ĉiuj estas tute korekte vestitaj: la viroj estas en blanka ĉemizo absolute sendifekta kaj senmakula; la virinoj ŝatas la diversecon kaj la modon. Ĉar tekstilaĵoj abundas, ne mankas elekteleco. La magazenoj estas plenplenaj de varoj sed ankaŭ de klientoj. Same por la restoracioj diversgradaj. Se vi akceptas modestajn pladojn, vi pagos tre malmulte. Per tio eble oni povus ekkompreni, kiel oni povas enspezi malgrandan salajron kaj ŝpari multe da mono por aĉeti multekostan biciklon aŭ televidilon.

Kuraĝema kaj laborema estas aliaj epitetoj, kiuj tute konvenas al ĉino. Ne estas hodiaŭaj emoj kaj ecoj; iam la praavoj konstruis la Grandan Muron, la Grandan Kanalon, fosis lagojn kaj per ties tero starigis apudajn mon-

tojn, konstruis riĉajn kastelojn kaj templojn por la plezuro de siaj imperiestroj.

Hodiaŭ ili konstruas sian landon. Ili baras riverojn por akiri elektron kaj irigacii vastajn kampojn, kiuj produktos nutraĵon por la popolo; faras brikojn kaj konstruas domojn por ŝirmi ĉiujn. Ve! La hodiaŭa plago estas la multnombrecio de la loĝantaro. La registaro konscias pri tio kaj provas bremsi la naskadon, donas informojn kaj rimedojn por atingi la celon; bedaŭrinde ne ĉiuj akceptas volonte, kaj necesas drastaj metodoj precipe en la kamparo, kie la malnovaj moroj havas profundajn kaj neelradikeblajn radikojn.

Ĉio do ne iras glate. Estas problemoj, certe multaj, ĉar kvankam la plejmulto estas disciplina kaj laborema, restas certe malbonaj elementoj pretaj kontraŭstari ĉiujn saĝajn decidojn.

Tiel estas en la tuta mondo; sed ĉe ni oni diras: "al io malbono utilas". Ni do estu optimismaj kaj rigardu estontecon rozkolora. Tia, mi ĝin vidis en Ĉinio.

S-ro Ludoviko Enizan kaj lia edzino(meze) inter ĉinaj esperantistoj en Pekino



PERADO DE "EL POPOLA ĈINIO" EN ZAGREBO

de SPOMENKA ŠTIMEC
(Jugoslavio)



F-ino Spomenka Štimec

PRI Esperanto mi okupiĝas profesie, laborante en la Internacia Kultura Servo, en Zagrebo. Tie mi tuttage estas ĉirkaŭata de diversaj Esperanto-temoj kaj unu el ili estas okupiĝo pri libroj kaj ĵurnaloj.

Nun post 11-jara funkciado de la Internacia Kultura Servo ne plu necesas multe varbi legantojn. Interesiĝemuloj mem venas al nia sidejo en Amruŝeva 5 en la urbocentro de Zagrebo, kiam ajn inter la 8-a kaj la 15-a horoj. Foje abonemuloj venas dum farado de iu grava laboro alispeca kaj mi nur rapide pritraktas ilin "supraĵe", interŝanĝas kun ili la plej esencajn informojn kaj turnas nin plue al mia laboro interrompita. En la paŭzo inter laboreroj mi foje pensas ke mi malbone agas, ĉar ili grimpante la

malhelajn ŝtupojn verŝajne planis iom babili pri Esperanto. Ĉu ili seniluziiĝas aŭ ĉu ili komprenas, ke tie ĉi oni abunde kaj diversflanke aplikas Esperanton kaj ĵurnalabono estas nur ties eta

parto? Feliĉe, okazas, ke pluraj alvenintoj envenas dum iuj malpli streĉaj momentoj kaj tiam estas okazo por pli trankvile paroli, laŭdi kutime la lastan numeron de "EPĈ".

Fakte, ĉu nun la tagoj aliel pasas ol antaŭe? Nun ni atendas, ke alvenu "EPĈ", dum antaŭe ĝi aperis en Zagrebo neatendite. "Ĉu jam la decembra numero?" miris ni iam. "Ĉu ankoraŭ ne venis la decembra? — demandas ni nun.

Stoko da EPĈ-numeroj konstante devus stari sur eta tablo.

LERNI KAJ INSTRUI ESPERANTON


de MARIO JESUS ORTEGON ESPINEL (Kolombio)

MIA nomo estas Mario Jesus Ortegon Espinel, kvardekunu-jara viro. Mi studis dum dek jaroj fizikon en la Nacia Universitato de Kolombio kaj nun mi studas en la fakultato de filologio kaj lingvoj de la sama universitato.

Mi lernis E-on antaŭ dek tri jaroj. Mi informiĝis pri ĝi, ĉar mia frato kaj alia esperantisto prelegis pri E-o en mia universitato, la Nacia Universitato de Kolombio de Bogoto, poste mi foliumis la libron "Teach Yourself Esperanto" kaj mi komprenis la lingvon per tiu libro.

Nun mi instruas la internacian lingvon al miaj esperantaj glerntoj.

Mi estas peranto de "EPĈ" kaj loĝas en Bogoto, Kolombio.



S-ro Mario Jesus Ortegon Espinel

Fakte ŝajnas al mi ke mi tien hieraŭ metis kelkajn ekzemplerojn, sed ili jam malaperis. Iuj vizitantoj jam regalis sin per informekzemplere. . . neniam mi sukcesas kolekti kompletan jar-kolekton. . . ĉiam forglitas iuj numeroj, eĉ tiuj poseditaj en pluraj kopioj.

Kiam kolektiĝas sufiĉe da abonoj, alportataj persone aŭ senditaj per poŝto, mi kutime semajnfine, tajpas ilin sur aboniloj. Ne tro krea laboro, estus verŝajne pli agrable promeni aŭ legi ion laŭ mia plaĉo. Sed kiam mi en urba aŭtobuso ekvidas iun duonkonatan homon kun malfermita "EPĈ", mi ĉiam sentas kontenton. Kaj mi hezitas ĉu alparoli lin aŭ silente scii, ke li profitas ankaŭ de mia semajnfina ero, kaj de la laboro de multaj homoj malproksime en Pekino.

Kiu havis bonŝancon konatiĝi kun redakcianoj kaj ekspedistoj, tiu legas ĝin ne nur kiel gazeton sed ankaŭ kiel elektitan mesaĝon de iu tre kara amiko.

Mi peras "El Popola Ĉinio" en Jugoslavio jam de dek jaroj, kaj pardonpetas al abonantoj, ke ankoraŭ tion mi ne faras perfekte.

(Daŭrigo de p.32)

* La aŭtoro estas prezidanto de la Tut-Ĉinia Sporta Federacio kaj la Ĉina Olimpika Komitato. En februaro ĉi-jare la aŭtoro gajnis arĝentan olimpikan ordenon donitan de la Internacia Olimpika Komitato.

** La celo de la olimpikoj estas: Sub la direktado de la olimpika idealo kuraĝigi, organizi kaj disvolvi sportadon, sportokonkurson, akceli kaj plifortigi la amikecon inter diverslandaj sportistoj kaj garantiĝi akuratan okazigon de la olimpikoj.



Tarifo: 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * 73-jara, tamen ankoraŭ sufiĉe vigla tradukisto kaj estro de Societo por Japana-Ĉina Amikeco per Korespondado, dez. kor. serioze nur kun ĉinoj pri vivo, korespondado, literaturo ktp. Kurisu Kei, Mogusa Danti 154-1004, Hino-si, Tokio, 191 Japanio.
- * Olimpikaj Ludoj viziteblas spirite: skribe aŭ sonbende interŝanĝe. Gastigurba letervespero okazos maje: ESPERANTO/1888 Century Park East 1000/Los Angeles, CA 90067/Usono.
- * S-ro Stanislav Kareš, Tylova 1262, 508 01 Horice, Ĉeĥoslovakio, 39-jara agronomo-plantkuracisto, sekretario de E-klubo. Intereso: ĝardenado, naturo, fotografado kaj interŝanĝo de bildkartoj.
- * Both Jolan, Str: Kozseptiz Nr. 380, Loc: Csikszentdomokos, (Sindominic), Jud: Harghita, cod: 4142, Rumanio, dez. kor. tutmonde pri ĉ. t.
- * Khosrow Mahdjubian (instruisto), dez. kor. tm. pri ĉ.t., kolek-

tas p.m., p.k. kaj gazetojn. P.O. Box 29, Langerud, Gilan, Irano.

- * Lenke Szasz, 4174 Praid, Nr. 130, Jud. Harghita, R.S. Rumanio, dez. kor. kun ĉinaj geesperantistoj.
- * 39-j. librokomercistino dez. kor. tm pri ĉ.t., volonte kun oficistoj el librokomerco. Margit Mobius, DDR-8211 Mohorn, Freiburger Str. 66.
- * 41-j. tradukistino dez. kor. tm pri ĉ.t. Helga Steffin, DDR-8027 Dresden, Hantzschstr. 8.
- * Nemes Csorgor (14-jara lernanto), Str. Siszt Ferenc 10, Bl. PC80, Ap. 4, Cart. Nufar II, 3700 Oradea, jud. Bihor, Rumanio, dez. kor. tm pri diversaj temoj, speciale pri kemio kaj biologio.
- * Jan Ulfik, Aleja Kwialow Nr 1/17, 42-606 Tarnowskie Gory, Pollando, deziras korespondi tm pri ĉ. t.
- * Kadarkatalin (18-j.), Str. Veche No 96, Gheorgheni, Harghita 4200, Rumanio, dez. kor. kun amikoj, ĉefe el Hungario, Francio, Anglio.
- * Kari Attila (18-j.), Bul. 25 August No. 70, Gheorgheni, Jud: Harghita 4200, Rumanio, dez. kor. kun amikoj el Hungario, Francio.
- * 18-jara fraŭlo deziras korespondi tutmonde, Hooman Abbaspour, P.O. Kesto 13-119, Teherano, Irano.
- * S-ro Nadasi Jozsef, H-5600 Bekescsaba, I. Penza 16, III. 31, Hungario, volus korespondi kun ĉinaj gefratoj.
- * Gabor Jbolya, Lazarea, cod: 4215, Str: Csinod: No467, Jud: Harghita, Rumanio, deziras korespondi tm pri ĉ.t.

Koko-monto—Parko en Nubaro

de HE ĈENG

LA monto, 800 metrojn super la marnivelo, kun 50-kilometra periferio, majeste staras ĉe la limo de la provincoj Henan kaj Hubej en la meza parto de Ĉinio.

Ĉi tie la jara meznombra temperaturo estas inter 12° kaj 14° C, eĉ en varma somero la monto havas agrablan klimaton, tial ĝi estas taŭga someruma loko. Kvar monatojn jare ĝiaj pintoj estas vualitaj de nubaro, pro tio ĝi ricevis la belan nomon “Parko en Nubaro”.

En la komenco de la kuranta jarcento, iu eksterlanda misiisto trovis, ke la loko havas prosperajn arbojn, sufiĉan fontakvon kaj mildan veteron, kaj aĉetis terpecon por konstrui domojn helpate de loka oficisto subaĉetita de li. Post tio Koko-monto ekhavis pli grandan famon. Komercistoj kaj misiistoj de pli ol 20 landoj kaj ĉinaj militaristoj kaj tiranaj bienuloj alvenis tien

unuj post aliaj. En mallonga tempo konstruiĝis diversaj somerumaj vilaoj kaj pavilonoj sub groteskaj montpintoj, ĉe fontoj aŭ riveretoj kaj en arbaro. Nun tiuj vilaoj jam fariĝis sanatorioj, kie laboristoj kaj oficistoj povas ĝui kuracadon de 3 ĝis 6 monatoj.

La monto abundas je groteskaj rokoj, nubmaroj kaj akvofaloj. Iuj el la rokoj similas strangajn bestojn kun timindaj faŭkoj, aliaj pendas ĉe krutaĵo, kvazaŭ tuj falontaj je ventobloveto. Inter la lokaj popolanoj cirkulas malnovaj legendoj pri la rokoj.


La Koko-kapa Roko staranta sur la ĉefpinto estas la plej fama el ĉiuj rokoj. Vidate de malproksime, ĝi aspektas kiel matene krianta koko kun etendita kolo; vidate de proksime, ĝi kun elstara brusto estas kvazaŭ tuj flugonta. Tial la monto ricevis la nomon Koko. Norde de ĝi estas la roko “aglo” staranta sur gran-

da fendita roko. Ili rigardas unu al la alia. Ĝenerale, koko estas malfortulo, sed tie la “koko” estas kun levita kapo kaj la “aglo” kun mallevita kapo. Tiu natura bildo vekas grandan intereson de turistoj.

La valo oriente de la monto abundas je sovaĝaj plantoj. Kiam oni iras sur montvojetoj ŝirmitaj de artemizioj, oni povas vidi prospere kreskantajn arbojn, diverskolorajn sovaĝajn florojn kaj akvofalojn ĉe ambaŭ flankoj. Printempe pompe disfloras rododendroj, sur la monto. Somere ĉie kreskas koreopsoj. Aŭtune, sen preparita manĝaĵo oni eĉ ne suferas malsaton tie duon-monaton. La lokanoj ofte diras: “Julie maturiĝas ĉinaj aktinidioj (*Actinidia chinensis*), aŭguste banano-similaj sovaĝaj fruktoj kaj septembre kaŝtanoj.” Aktinidioj estas sovaĝaj fruktoj riĉaj je vitamino C, utilaj al suferantoj de kancero, kormalsano k. a. Nun Koko-forstokulturejo jam sukcese kulturis ilin.


La monto situas en la regiono inter la norda kaj suda klimatoj. Tie kreskas sudaj metasekvojoj kaj oleaj kamelioj kaj nordaj paŭlovnioj, pinoj kaj cipresoj. La forstokulturejo trovis, ke tie kreskas pli ol 30 specoj de arboj kaj diversspecaj drogherboj. Antaŭ kelkaj jaroj la forstokulturejo kulturis tie ruĝajn ginsengojn de Ĝjilin-provinco, pseŭdoginsengojn de Junnan-provinco kaj aliajn plantojn.

Koko-monto en aŭtuno




Koko-Monto – Parko en Nubaro

Fotoj de ĈOU ĈINĈJUN



La monto vidata de malproksime




Koko anoncas tagiğon.





Laborista sanatorio
neĝkovrita



La monto en luna nokto


**FOTOJ FARITAJ
DE E-ISTOJ**



de **G. ARAB** (IRANO)

PONTO EN MIA HEJMVILAĜO

de ŬANG GŬANGMING



MIA hejmvilaĝo, tre malgranda, havis nur dek familiojn. Apud la vilaĝo fluas ne tre profunda, sed tre klara rivero. Sude de la vilaĝo, super la rivero kuŝis mallarĝa ponteto.

En tiu vilaĝo mi pasigis mian infanecon. En varmega somero mi ŝatis baniĝi kaj naĝi en la rivero. Kelkfoje, por ludi kun miaj kamaradoj en la vilaĝo trans la rivero, mi ne iris la ponteton, sed simple saltis en la riveron kaj naĝis rekte al la transa bordo.

La ponteto klare gravuriĝis en mia memoro. Oni nomis ĝin ponteto, malgraŭ ke ĝi estis nur mallarĝa, maldika tabulo eĉ kun truoj en la mezo. Transiri la ponteton estis tre danĝere por infanoj kaj maljunuloj. Foje okazis malfeliĉo eĉ la ponteto.

Estis pluva tago antaŭ pli ol 30 jaroj. La filo de Onklo Ma volis iri trans la riveron por distriĝi kun siaj kamaradoj. Kiam li suriris la ponteton, li glitfalas en la riveron, dume ĉiuj laboris en la kampoj kaj neniu rimarkis tion. Kiam Onklo Ma informiĝis pri la malfeliĉo, li tuj falis svene.

Antaŭe Onklo Ma estis tre serena. Li tre ŝatis infanojn kaj ofte

estis ĉirkaŭita de ili. Sed de kiam lia filo mortis, li tute ŝanĝiĝis en la humoro. Li ofte rigide rigardadis la ponteton, murmurante al si mem: "Se mi havos monon, mi nepre konstruos cementan ponton." Tempopaso ne mildigis lian malĝojon. Mi estis samaĝa kiel lia filo. Tiam mi, malgranda knabo, ankoraŭ ne sciis konsoli lin, sed li pli kaj pli ŝatis min. Kelkfoje, kiam li vidis ke mi iris al la ponteto, li tuj paliĝis, tremis per la tuta korpo kaj kriegis al mi: "Revenu, tuj revenu. . . Mi akompanos vin trans la riveron. . ."

Li laboris diligente, vivis modeste kaj ŝparis ĉiun eblan groŝon. Post kelke da jaroj li aĉetis per sia propra mono plurajn larĝajn kaj fortikajn tabulojn kaj per ili anstataŭigis la mallarĝan truan pontotabulon, kaj cetere li aldonis al la nova ponteto du vicojn da apogiloj.

Poste mi transloĝiĝis en la urbon kune kun miaj gepatroj, kaj de tiam mi malofte aŭdis pri Onklo Ma.

Antaŭ kvin jaroj mi kaj miaj gepatroj veturis al la hejmvilaĝo por viziti malnovajn amikojn. Ekvidinte min, Onklo Ma montris apartan ĝojon. Li multe maljuni-

ĝis kaj malfortiĝis. Li jam ne povis fari kamp-laborojn kaj nur prizorgis la grentenejon de la produkta brigado.

Antaŭ nelonge mia amiko, kiun mi konis en la infaneco, skribis al mi, ke Onklo Ma forpasis. En la lastaj jaroj li estis vivtenata de la kolektivo. Li grave malsaniĝis kaj konsciis, ke li jam ne povas resaniĝi. Li do venigis al si la brigadestron kaj samvilaĝanojn. Per tremetanta mano li elprenis paperan paketon el la poŝo de la ĉemizo. Li petis la estron malvolvi la paketon. Kiam la paketo estis malfermita, oni vidis en ĝi kaj dek-jŭanajn monbiletojn kaj kelkajn monerojn. Per la apenaŭ aŭdebla voĉo la maljunulo diris al la ĉeestantoj vorton post vorto: "Konstruu ponton. . . cementan ponton. . . por ke la infanoj ne falu plu en la riveron. . . eble sufiĉas la sumo. . ." La maljunulo montris kontentan rideton kaj forpasis en trankvilo.

Nun la mallarĝa ponteto jam estis anstataŭigita per fortika cementa ponto. Sed la malnova ponteto restas neforviŝebla en mia memoro, ankaŭ la lasta rideto de Onklo Ma restos ĉiam en mia koro.

LA ESPERANTO-INSTITUTO DE ĜJILIN-PROVINCO FONDITA

En la 12-a kaj 13-a de januaro la Ĝjilin-a Esperanto-Instituto okazigis sian fondiĝan kunvenon en la provinca ĉefurbo Ĉangĉun. La kunvenon ĉeestis Liŭ Ĝingĝi, sekretario de la provinca komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (KPC), Hu Hoŭĝjun, vicestro de la propaganda departemento de la provinca komitato de KPC, kaj Sun Ŝja, vicprezidanto de la provinca Federacio de Socio-sciencaj Asocioj. Ili varme gratulis la fondiĝon de la Esperanto-Instituto, alte taksis Esperanton kaj esprimis sian aktivan subtenon al la instituto. Veterana esperantisto Ĝaŭ Dongli, estro de la Oficejo pri Eksteraj Aferoj de la provinco, estis elektita kiel ĝia honora prezidanto, kaj Ŝang Ŝjanĝang, prezidanto de la Fremdlingva Asocio de la provinco, estis elektita kiel ĝia prezidanto.

ESPERANTA PROGRAMERO DE ĈCT

Antaŭtagmeze de la tria kaj vespere de la kvina de januaro ĉi-

jare, la Ĉina Centra Televizio trifoje prezentis per videoregistro la Esperantan lernadon kaj aplikadon de Jang Kajjŭan, direktoro de la Ĉangŝa-a Filio de la Ĉina Turisma Servo. Li komencis lerni Esperanton antaŭ kelkaj jaroj kaj nun uzas la lingvon en turismo. Esperantistoj de iuj landoj jam skribis al li pri sia vojaĝo al Ĉinio en la kuranta jaro. La videoregistro estas farita de la Hunana Televizio kaj plurfoje elsendita en la provinco.

ESPERANTA INSTRUADO DE S-INO V.S. EICHHOLZ EN ĈINIO

En la lasta decembro, invitite de Anhuj-universitato, kanada Esperanta instruistino Vilma Sindona Eichholz venis al la universitato por instrui tie Esperanton. En februaro ŝi funkciigis Esperantokurson por la lokaj esperantistoj.

ESPERANTAJ ARTIKOLOJ EN «ENCIKLOPEDIO PRI LUSIN»

La kompilado de la vortaro estas prizorgata de la Ĉina Studrondo de Lusin, la Muzeo de Lusin en Pekino kaj la Popola Eldonejo de Siĉŭan. La enciklopedio havas sep artikolojn pri esperantigitaj verkoj de Lusin «La Ĉefa Historio

de A-Q», «Elektitaj Noveloj de Lusin», «Noveloj de Lusin», «Sovaĝa Herbaro» kaj «Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero». La artikoloj, eksplikitaj de Hoŭ Ĝiping, estas jam publikigitaj en la «Rudimentaj Esploroj pri Lusin».

DEBUTO DE LA DUMONATA GAZETO «LA ESTONTECO»

La dumonata gazeto «La Estonteco» redaktata de la Esperanta Asocio de Junnan-provinco kaj la Socia Universitato de Kunming (la ĉefurbo de la provinco) debutis en la lasta februaro. La gazeto havas rubrikojn de literaturo, esperanta-ĉina legaĵo, fundamenta gramatiko, specialaj verkoj, korespondado, nova libro, E-movado k.a. Ĉiu numero aperigas ankaŭ lernomaterialojn kaj referencaĵojn por tutlandaj gejunuloj. La Eduka Departemento de la provinco sankciis, ke post studo la sukcesintaj ekzamenitoj ricevos diplomon.

ESPERANTO-KLUBO FONDIGIS EN MARAKAJBO

La 15-an de decembro 1983 en Venezuelo fondiĝis Marakajba Esperanto-Klubo (MEK), kaj ĝia organo Marakajba Stelo aperas en la lasta semajno de ĉiu monato. Tiu evento okazis dank' al la klopodado de s-ano David G. Valcillos V., kiu lernis Esperanton en 1962 kaj ekfunkciigis Esperantokurson en septembro 1976. Tiu kurso signis la komencon de Esperanto-movado en la urbo. En la lastaj jaroj li gvidis plurajn E-kursojn inkluzive tiun por blinduloj en la loka blindula asocio en 1978. Li estas ankaŭ la delegito de la Venezuela Esperanto-Asocio en Marakajbo.

ESPERANTO-KURSO POR SOLDATOJ

Lastatempe nia peranto en Jugoslavio Milorad Djurdjevic informis nin, ke li sukcesis enkonduki

*Ĉeestantoj de la fondkunveno de
la Ĝjilin-a Esperanto-Instituto*





Sino Vilma Sindona Eichholz en lekciado



Membroj de la Marakajba Esperanto-Klubo en Zamenhofa Tago

Esperanton en kazernon de Smederevo post ses-jara penado. Nun pli ol 50 soldatoj lernas Esperanton ĵaŭde kaj sabate po 90 minutoj, kaj li klopodas konvinki komandantojn por ke Esperanto-kurso fariĝu konstanta.

E-KURSO EN JUGOSLAVA REVUO

En la nacilingva dumonata revuo Moderna Fajroestingistaro de Jugoslavio aperadas E-kurso en ĉiu

numero po unu leciono. La enkonduka teksto eldoniĝis jam en la n-ro 9-10 de 1983. La eldonkvanto de la revuo estas 10 000 kaj ĝi estas legata ankaŭ eksterlande. La lecionoj enhavas parte esprimojn specifajn por tiu fako.

KULTURAJ ARANĜOJ DE ESPERANTO-DOMO GRESILLON

La kulturaj aranĝoj 1984 de Esperanto-Domo estas jene:

1. Internacia Renkonto de Infanoj por printempo (1-a ĝis 7-a de aprilo) kaj por somero (1-a ĝis 22-a de julio)

2. Kursoj tri-nivelaj por internacia ĉeestantaro (22-a de julio ĝis 5-a de aŭg.)


3. Esperanto-kurso per slojdo (5-a ĝis 19-a de aŭg.)

4. Renkonto de blindaj kaj neblindaj esperantistoj (19-a de aŭg. ĝis 2-a sept.)

La ĥoro gvidata de s-ro Zlatko Ĉuriĉ en Radio/Sarajevo post prezentado en la 21-a Jugoslava Esperanto-Kongreso en 1985



Naskiĝo de la super-komputero “Lakta Vojo”



La ĉambro por la super-komputero

DEPOST la apero de la unua komputero en la mondo en 1946 la industrio de komputero ricevis grandan disvolviĝon kaj fariĝis unu el la ĉefaj manifestiĝoj de la modernaj sciencoj kaj teknikoj. Antaŭ dudek kvin jaroj Ĉinio elfaris sian unuan elektron-tuban komputeron. En la ses- kaj sepdekaj jaroj ĝi elfaris transistorajn komputerojn povantajn fari dekmilojn, centmilojn kaj milionojn da operacioj sekunde. Kun la progreso de sciencoj kaj teknikoj la scienc-esploraj institutoj kaj produktaj branĉoj

metas al la industrio de komputero pli kaj pli altajn postulojn. Tiel Ĉinio komencis mem projekti kaj produkti super-komputeron povantan fari pli ol cent milionojn da operacioj sekunde.

En la fino de novembro 1977 ĉefe la Universitato de Nacidefendaj Scienco kaj Tekniko prenis sur sin la taskon fari super-komputeron. La pioniroj de la komputera afero de nia lando en la sesdekaj jaroj konsistigas la ĉefan forton de la laboro. Ili akumulis sperton en la projekta-

do de komputeroj povantaj fari dekmilojn da operacioj kaj milionojn da operacioj sekunde. Fine la super-komputero estis sukcese elfarita, dank' al la kuna penado de la sciencistoj kaj laboristoj kaj kunlaboro de specialistoj de dekoj da scienc-esploraj institutoj, produktaj entreprenoj kaj komputero-uzantaj organizoj. Oni donis al ĝi la nomon “Lakta Vojo”.

Novembre de 1983 la ŝtata ekspertiza grupo el 95 komputero-fakuloj faris al ĝi provon de

sep fakaj temoj kaj fine fidindan ekspertizon. La provo kaj ekspertizo iris en granda, hela kaj pura komputerejo de la Universitato de Nacidefendaj Scienco kaj Tekniko en Ĉangŝa. La flaveta cilindra komputero el sep ŝrankoj staris malantaŭ granda plastvitra fenestro. La komputero sur bruna soklo aspektis kiel renversita palaca lanterno. Ĝi sukcese trapasis la rigoran ekzamenon de la grupo. La operacioj trifoje ripetitaj de ĝi montris, ke ĝiaj solvoj al 26 problemoj, tipe koncernantaj la nacian ekonomion kaj sciencan esploron, estas tute ĝustaj kaj ĝia precizeco estas konforma al la projektaj postuloj. La specialistoj ekzamenis ankaŭ la fidindecon de monomanipula kaj polimanipula sistemoj de la komputero, kaj la rezulto montris, ke ĝi povas fari samtempe plurajn operaciojn.

Krome la ekzameno per la difinitaj problemoj, la komputero solvis ankaŭ multajn malfacilajn problemojn starigitajn de specialistoj. Ĝi laboris nur 9 minutojn kaj 28 sekundojn por precize solvi unu el ili, kiun oni antaŭe operaciis interrompe plurajn monatojn per alia komputero povanta fari 300 000 operaciojn sekunde, kaj por unu donitaĵo ĉi tiu devis labori pli ol 70 horojn senĉese. Por alia problemo pri petrolo "Lakta Vojo" laboris nur 0.4 sekundon, sed antaŭe oni ne povis solvi tiun problemon per alia komputero povanta fari du milionojn da operacioj sekunde. "Lakta Vojo" sukcese solvis pli ol cent malfacilajn problemojn.

"Lakta Vojo" trapasis la ekspertizon! Ĉinio nun havas sian propran komputeron povantan fari cent milionojn da operacioj sekunde! La ĉeestantaj sciencistoj kaj teknikistoj emocie gratulis sin reciproke.

En la mondo nur malmultaj landoj povas fabriki tian superkomputeron. En la sukcesa prova fabrikado de la komputero oni venkis multajn malfacilojn en teorio, tekniko kaj teknologio en malbonaj laborkondiĉoj.

"Lakta Vojo" havas centojn da presitaj ĉasioj kun milionoj da lutpunktoj, inter kiuj la plej malgranda interspaco estas nur 0.3 milimetro. Ajna pseŭdoluto povas kaŭzi perturbon kaj ĉiu ajn lutpunkto kun har-dika dor-neto povas ebligi fuŝkontakton. Pro la treege rigoraj postuloj en lutado, komence iuj junaj laboristinoj eĉ mantremis, kiam ili ekuzis elektran lutilon. Sed ĝuste ili, meznombro 22-jaraj junulinoj, venkis la malfacilojn kaj luttis milionojn da punktoj senerare.


La ĉefa parto de "Lakta Vojo" havas pli ol 150 specojn de plurtavolaj presitaj ĉasioj kun densaj cirkvitoj kaj truetoj. Kaj iujn el ĉi tiuj oni devas kontaktigi, sed aliajn ne. Kiel oni povas kon-

troli la lutojn ĝustaj? Tia laboro estas subtila kaj temporaba. Sen speciala aparato oni ne povas kontroli ilin rapide kaj senerare. Dekkelkaj teknikistoj de la aŭtomata sekcio elfaris novan aparaton, per kiu oni povas ekzakte mezuri unu ĉasion en dekelkaj sekundoj.

Kutime oni kompilas la softvaron nur post la finiĝo de la reguligo de la hardvaro. Por mallongigi la tempon de farado de "Lakta Vojo" paro da mezaĝaj geedzoj-sciencistoj kun kelkaj helpantoj kompilis la programon kun preskaŭ dekmil linioj, konsultinte materialojn kun miliono da ideografiaĵoj. Kaj tiel la reguligo de la tuta softvaro plenumiĝis unu jaron antaŭ la difinita dato.

"Lakta Vojo" faros kontribuojn al la petrolo industrio, geologia prospektorado, mez- kaj longperioda meteologia prognozozoj, traktado de la bildoj resenditaj de satelito, sciencaj esploroj kaj nacidefenda konstruado.

La dorsflanko de la komputero



MARŜU AL LA OLIMPIKOJ



La aŭtoro

LA jaro 1984 estas la unua jaro de la 23-a olimpiado kaj nomata de la mondaj sportistaj rondoj Olimpika Jaro. Ĉi-jare okazis la 14-aj Vintraj Olimpikoj kaj okazos la 23-aj Someraj Olimpikoj. Tio havas gravan signifon por la Ĉina Olimpika Komitato. Ĉinio jam sendis delegacion el 37 sportistoj al la 14-aj Vintraj Olimpikoj okazintaj en Sarajevo de Jugoslavio kaj sendos delegacion el ĉ. 300 personoj al la 23-aj Someraj Olimpikoj, kiuj daŭros de la 28-a de julio ĝis 12-a de aŭgusto en la urbo Los-Anĝeleso de Usono. Estos la unua fojo, ke la Ĉina Popola Respubliko partoprenos post sia fondiĝo en diversaj sportobranĉoj de la Someraj Olimpikoj. Tio montras intiman rilaton inter la ĉinaj sportistaj rondoj kaj la olimpikoj kaj ankaŭ aktivan klo-

podon de la Ĉina Olimpika Komitato por efektiviĝi la celon** de la olimpikoj kaj propagandi la idealon de la olimpikoj.

En 1922 la ĉinaj sportaj organizoj estis agnoskitaj de la Internacia Olimpika Komitato. Poste ĉinaj sportistoj partoprenis en la 10-aj, 11-aj kaj 14-aj Someraj Olimpikoj okazintaj respektive en 1932, 1936 kaj 1948. Ĉar Ĉinio tiam estis malforta kaj malriĉa, ankaŭ ĝia sporto postiginta, tial ĝi eĉ ne povis sendi multe da sportistoj al la olimpikoj, por ne paroli pri bonaj sukcesoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la reorganizita Ĉina Olimpika Komitato, venkinte diversajn malfacilojn kaj barojn, sendis delegacion el 40 personoj partopreni en la 15-aj Someraj Olimpikoj okazintaj en Helsinki de Finnlando en 1952. Dum la 21 jaroj de 1958 ĝis 1979, la kontaktiĝo de la Ĉina Olimpika Komitato kun la Internacia Olimpika Komitato estis interrompita pro la konata kaŭzo.

Estis ĝojinde, ke dum la tempo, en kiu lordo Michael Norraes Killanin funkciis kiel prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, dank' al multjara komuna klopodo de ambaŭ flankoj la Ĉina Olimpika Komitato oficiale reakiris sian leĝan rajton en la Olimpikoj en novembro de 1979. Poste, s-ro Juan Antonio Samaranch prenis sur sin la prezidantecon de la Internacia O-

limpika Komitato kaj antaŭenpuŝis al nova etapo la kunlaboron inter la ĉinaj sportistaj rondoj kaj la Internacia Olimpika Komitato. De la 16-a ĝis 18-a de januaro ĉi-jare, invitive de prezidanto Juan Antonio Samaranch, Li Menghŭa, estro de la Ŝtata Fizik-kultura kaj Sporta Komisiono de Ĉinio, oficiale vizitis la sidejon de la Internacia Olimpika Komitato.

Ĉio supre dirita multege kuraĝigis la ĉinajn sportistojn. "Marŝi al la Olimpikoj" jam fariĝis ilia plej frapanta slogano kaj partopreni en la olimpikoj — ilia forta deziro.

La Someraj Olimpikoj ĉi-jare havas dudek unu konkursajn sportobranĉojn kaj du porprezentajn sportobranĉojn. La ĉinaj sportistoj partoprenos en 15 konkursaj sportobranĉoj: Ili estas atletiko, arkopafado, kajaka remado, korbopilko, biciklado, skermado, gimnastiko (inkluzive de la arta), manpilko (virina), judo, remado, pafado, naĝado (inkluzive de plonĝo kaj akvo-pilko), flugpilko (virina), halterlevo kaj lukto.

Mi sincere esperas, ke la ĉinaj sportistoj daŭre ekzercos sin kaj faros kontribuon por gajni bonajn sukcesojn en la olimpikoj, plifortigi la amikecon inter la ĉinaj kaj diverslandaj sportistoj kaj propagandi la idealon de la olimpikoj.

(Daŭrigo sur p.25)

Por riĉigi studentan vivon

—Pri la studenta ensemblo de la Pekina Universitato

LA 29-an de decembro 1983, la aŭlo de la Pekina Universitato estis plenplena de spektantoj, kiuj ŝtopis eĉ la koridorojn. Ĉi tie la studenta ensemblo de la universitato estis ludonta ok-aktan modernan dramon “Historio de la Ĉina Muziko”.

Komenciĝis la dramo. La historia kurteno malrapide malfermis la 20-an jarcenton en humiliĝo kaj suferego. La dramo prezentis la ĉinan modernan muzikon, de ĝia naskiĝo en la lastaj jaroj de Ĉing-dinastio (1644-1911) ĝis ĝia prosperiĝo en la 80-aj jaroj. La dramo koncize reaperigis la disvolviĝon de la ĉina moderna muziko, la vivon kaj batalon de la ĉina popolo en diversaj historiaj periodoj. Ĝi ne estis ordinara koncerto, sed muzika dramo kuniganta la enhance malsamajn voĉ-muzikajn verkojn per simplaj intrigoj kaj vivaj formoj laŭ la historia evoluo kaj arta bezono. Tiu nova provo de muzika historio rikoltis varmajn aplaŭdojn de la aŭskultantaj studentoj.

La 130-membra studenta ensemblo havas grupon de moderna dramo, dancistan grupon, orkestron, nacian orkestron, ĥoron kaj leĝermuzikan orkestron. Ĝiaj membroj lernas la nacian arton kaj absorbas elitaĵon el la fremdlanda arto por vigligi la universitatan vivon kaj levi artan edukitecon kaj aprezan kapablon de la studentoj.

En la lastaj jaroj la ensemblo mem verkis kaj ludis nombron da programeroj pri studenta vivo, inter ili la moderna dramo “Sorto” kaj poemdeklamo “Kontribuo” estis premiitaj en la Studenta Teatra Festivalo de Ĉinio kaj tiu de Pekino. Kune kun ĉefurbaj komponistoj ĝiaj membroj verkis pli ol 50 kantojn pri studenta vivo, kiuj estis ŝatataj de la studentoj. La televida muzika


filmo “Kantoj en la Pekina Universitato”, kiu raportas pri ilia kantado kaj prezentado, vekis vastan eĥon ĉe la spektantoj post elsendo de la Centra Televido. La kantoj “Mi Havas Paron da Esploraj Okuloj” kaj “Piedsignoj” en la filmo rapide disvastiĝis inter la studentoj kaj aliaj gejunuloj de Ĉinio.

La Pekina Universitato estas supera lernejo kun arta tradicio. En la komenco ĝi nomiĝis Ĉefurba Supera Lernejo, en kiu iam naskiĝis “Kanto de Lernejo”, la plej frua moderna muziko en Ĉinio. En 1919, Ĉaj Ĵuanpej, fama ĉina edukisto, esp-isto kaj tiama rektoro de la universitato, iniciatis fondiĝon de la unua studenta muzika asocio de Ĉinio. La asocio studis kaj ludis famajn komponaĵojn ĉinajn kaj eksterlandajn kaj okazigis koncerton de Betoveno unuafoje en Ĉinio.

Septembre de 1983, en du tagoj, post kiam la studenta ensemblo publikigis anoncon pri sia organiziĝo kaj akcepto de membroj, pli ol 300 ĉinaj studentoj kaj iuj fremdlandaj studentoj sin anoncis por aliĝo. La ensemblo devis fari rigoran ekzamenon kaj akceptis 130 membrojn. Iu japana studento fariĝis sola eksterlanda membro de la ensemblo.

En la ensemblo la membroj povas plene disvolvi sian artan talenton. Post rigora trejnado rapide progresis ankaŭ tiuj membroj kun kompare malalta arta nivelo. En la grupo de moderna dramo estis du membroj Jing Da de la psikologia fakultato, filo de fama aktoro Jing Ĵuoĉeng, kaj lia kuzo Jing Ĝuang, de la fizika fakultato. Arte influate de la familio, ili ambaŭ inklinas al arta prezentado. En la grupo ili respektive reĝisoris la dramojn “Ridindaj Preciozulinoj” de Moliero,

Sceno el la dramo “Historio de la Ĉina Muziko”





Koregrafinoj en laborado.

“Edziĝpeto” de A. P. Ĉeĥov kaj “Sunleviĝo” de la ĉina dramisto Caŭ Ju. Ilia reĝisorado bone montris la stilon kaj ideon de la originaloj kaj akiris bonan efikon. Nun Jing Da jam finis sian universitatan studon kaj Jing Ĝuang aktivis ankoraŭ en la ensemblo. La supre menciita “Historio de la Ĉina Muziko”, elektita kiel grava teatraĵo en la arta festivalo de la Majkvara Junulara Festo ĉi-jare, ja estas verkita kaj reĝisorita de Jing Ĝuang kaj liaj kamaradoj.

En malpli ol duonjaro de post la fondiĝo, la ensemblo sukcese ludis la klasikan ĉinan komponicion “Alta Monto kaj Flua Akvo” kaj la verkojn de Franz Schubert, Betoven, Mozarto k.a. Ili kuraĝe adaptis la tradician pekin-operon “Ĉe la Vojforko Sanĉakou” al pantomimo, kombinate la tradician luktarton kaj prezentarton de la pekin-opero. Krome, la de ili luditaj “Danco de Aŝji-anoj en la Luna Nokto” kaj japana danco “Solangmusi” estis tre ŝatataj de la instruistoj kaj studentoj de la universitato. Cuj Ŝjang, studento de la orient-lingva fakultato, funkcias kiel koregrafo kaj reĝisoro de la dancista grupo. Li havas

vastan intereson, ne nur dancas bele, sed ankaŭ estas eminenta sportisto. Li estas unu el la ĉefaj membroj de la atletika kaj gimnastika trupoj de la universitato. Li plurfoje gajnis ĉampionecon en la studenta sportkunveno.

Iu artisto diris: “Vivo ja estas arto.” Jes, la vivo ne povas disiĝi de la arto. La postleciona arta aktivado vere riĉigis kaj plibeligis la studentan vivon.

La 22-jara Ŭang Ĉjang, estro de la ensemblo, estas kvaraklasa studento de la fako de angla literaturo. Hazardo kondukis lin en la ensemblon. Li ŝatas verkojn de Ŝekspiro, Bernard Shaw kaj Ĉeĥov. Li ludis ne nur la rolon de juna generalo de la antikva Ĉinio, sed ankaŭ tiun de dekadenca rusa bienulo. En la “Historio de la Ĉina Muziko” li sukcese ludis ok rolojn. Ankaŭ li estas kadro de la fakultato, lia aktivado en la ensemblo ofte malakordiĝis kun lia studo kaj laboro. Sed li ĉiam racie solvis tiujn malakordojn. Li amas la streĉan kaj signifoplenan studentan vivon.


Ĝang Ŝjuesong, membro de la leĝermuzika orkestro, forte inklinas al matematiko jam de siaj mezlernejaj jaroj. Li studas en la informa fako de la matematika fakultato. Li, saĝa kaj sagaca, ĉiam lernas bone. Sed iam li estis apatia pri la vivo kaj plendis, ke la universitato estas nur hermetika ujo plena de scioj. Li ekfumis kaj ekdrinkis por peli tedon. Li kondukis malĝentile kaj vestis sin maldece. Poste li partoprenis en la leĝermuzika orkestro kaj ekamis muzikon, kio riĉigis lian vivon. Li abstinis de fumado kaj drinkado kaj fariĝis ĝentila. Li diris: “La arto estas bela. Kiu eniris en tiun sferon, devas strebi al la belo.” Li lernas bone kaj direktas prezentadon de leĝermuzika grupo. Pro tio li estas alte taksata de la amasoj.

Ne nur Ĝang Sjuŝong, sed ankaŭ iuj aliaj ŝanĝiĝis psike, influate de la ensemblo. Iuj antaŭe ofte sentis sin solecaj, sed poste sereniĝis en tiu vigla kaj solidara kolektivo kaj fariĝis aktivuloj en la arta aktivado.

Ĉu fariĝi profesiaj aktoroj post la diplomiĝo? Pri tio neniu el la membroj de la ensemblo pensis. “Nia idealo estas frapi la pardonon de la sciencoj. Ni ĝuas artan belon kaj semas la artajn semojn inter niaj kunlernantoj por plibeligi nian studentan vivon,” jen ilia respondo al tiu demando.

Studenta Ensemblo de la Pekina Universitato

Fotoj de SANG SJANGSEN



Ringa gimnastiko

Gajaj gejunuloj





Hispana danco en vesperkunveno




En amuzkunveno de instruistoj kaj studentoj



La danc-trupo prezentas memverkitan dancon «Poezio de Maro».



Reĝisoro Ju Janfu (la dua de dekstre) helpas al la studentoj pri prezenta arto.






En semajfino la membroj de la ensemblo instruas al studentoj naciminoritatan dancon.



En mateno



Instruistino en leciondonado
al la studentoj pri sceneja
prezentado



EDZINO DE MINISTO

(NOVELO)

LA brila suno sur la serena ĉielo origas la arbarojn sur la montoj. La ŝtonaj vojetoj zigzagaj sur la montoj estas kovritaj de dikaj tavoloj da falintaj folioj grandaj, malgrandaj, longaj, rondaj, verdaj, brunaj, flavaj, grizaj. . . En vento la folioj leviĝis, ekflugis antaŭen turniĝante, kiel gajaj papilioj.

Iom antaŭe, neniu havis tempon por ĝui la pejzaĝon pro amaso da dommastrumadoj kaj kamlaboroj. Nun vidante la flirtantajn foliojn sur la vojeto, ŝi kvazaŭ komprenis ke ankaŭ la folioj hastas ien.

Lanĝing ekiris frumatene. Ŝi estis iranta al sia edzo, kiu laboras en karbominejo 30 li-ojn (1 li-o=0.5 km.) fore. Ŝi volis diri al li, ke li baldaŭ fariĝos patro. Fakte ŝi povus skribi al li, tamen ŝi ne volis, ŝi preferis mem iri por informi lin pri tio. Ŝi pensis en si, ke restas malmultaj laboroj en la kampoj, kaj cetere 30 li-oj ne estas longa distanco por ŝi. Duontaga piedirado jam sufiĉas por atingi la minejon. Kaj estos multe pli interese informi lin vidalvide. Sed. . . sed kiel komenci la parolon?

Ŝi sidiĝis sur granda ŝtono apud la vojo. Malfrua aŭtuno. La vento fariĝis multe pli malvarmeta. Se la edzo sciis, ke ŝi jam gravediĝis kaj piediras al li,

li certe kulpigus ŝin kun kordoloro. Sed al ŝi tio ne helpas. Ŝi ne estas virino delikata, kaj cetere estas plezure por ŝi iri sur tiu vojo. Sube de la monto ja estas ŝoseo konstruita antaŭ longe, kaj aŭtobusoj senĉese kuras,

sed ŝi ja ofte iras sur la montvojeto, ĉar ĝi faras al ŝi belan rememoron. Ĉiufoje, kiam ŝi iras sur la vojeto, ŝi facile rememoras la jarojn antaŭ sia edziniĝo. Tiam ŝi kaj ŝiaj kamaradinoj iris al kantokonkurso okazanta ĉiujare



Ilustrita de ĜU ĴŬEKUJ

kaj ĉiam prenis la saman voje-ton, kaj ambaŭflanke de la vojo floris sveltaj mirtoj. Foje malligiĝis al ŝi la ŝulaĉoj. Ŝi postiris al la kamaradinoj, kaj feliĉe renkontis junulon Along, kiu tre amas ŝin en la koro. Ha, tiu junulo de najbara vilaĝo eble ne sciis, ke ŝi amas lin, sian samlernejanon. Ili interŝanĝis misterajn rigardojn. Ĉio silentis ĉirkaŭe, nenia venteto estis sentebla. Along plukis du mirtajn florojn de sama tigo kaj donis ilin al Lanjing. En embarasiĝo li defaligis unu petalon. La dolĉa amo ebruiĝis la du junajn korojn kaj ankaŭ la glatan montvojon. . .

Lanjing kunportis nur malgrandan bambuan korbon, en kiu estis kelkaj vestoj kaj buloj el glueca rizaĵo. Kiam ŝi estis preparanta la bulojn, ŝi nature imagis al si, ke ŝia edzo kaj liaj kamaradoj tuj ĝojiĝos ilin vidinte, kaj Ŝjaŭ Lin, amiko de ŝia edzo, certe iros al lignaĵo-prilaborejo kaj reportos de tie amason da lignetoj, ekbruligos ilin kaj poste ĵetos la bulojn en la fajron. Bakate, la buloj pufiĝos, kraketos kaj kovriĝos de veziketoj, cindro kaj karberoj. Ili do konkureprenos bulojn el la fajro, ŝovos ilin en la buŝon, malgraŭ ke ili estas tre varmaj. La varmegaj buloj algluiĝos al ilia gorgo, kaj ĉiuj kriegos de brula doloro, sed tamen ili faros fortan englutadon. Kiam ili ĉiuj satiĝos kaj la fajro estingiĝos, ili disiĝos en plena ĝojo kaj neniam forgesos diri al ŝi "dankon".

Kaj ĉiufoje, kiam tio okazis, ŝia edzo certe infane petoladis same kiel liaj kolegoj. Per bastono en la mano li fosadis en la fajro, instigadis tiun kaj ĉi tiun kapti bakatan bulon, sed li mem nur ĝoje ridis, ĉar li bone sciis,

ke Lanjing preparos por li aparte. Nun li nur volis sin amuzi kune kun la kolegoj en la gajeco alportita de la edzino. Nokte li flustris al ŝi: "Ĉiuj ŝatas vin."

Jes, ĉiuj ŝatas ŝin. Ŝi scias, ke oni ŝatas ŝin ne pro tio, ke ŝi ĉiufoje alportas al la kamaradoj bulojn aŭ sukajn longanojn, sed pro tio, ke ŝi estas edzino de ministro, firmvola virino sincere amanta sian ministan edzon kaj plenumanta la tutan dommastrumadon.

Sed antaŭe ŝi neniam atendis ke ŝi fariĝos edzino de ministro. Kiam Along fariĝis ministro, ili ankoraŭ ne geedziĝis. Along demandis ŝin: "Lanjing, mi iros labori en minejo, ĉu vi volas edziniĝi al mi?"

"Kial ne?"

"Ĉar ĉiuj diris, ke la laboro en la karbominejo estas laciga, malpura kaj sensuna, kaj cetere. . . kaj cetere ofte okazas akcidento."

Lanjing silentis longan tempon.

Iuj en la vilaĝo diris, ke ili preferas balai stratojn ol labori en minejo. Por balaisto plej danĝera estas nur tordvundo al la piedoj, sed por ministro la morto ĉiam lin minacas. Ĉie en la galerio estas ŝtonoj kaj kiu scias, kiam ili falos sur la kapon. Kien fuĝi? Kien sin kaŝi? Sed la varbantoj de la minejo diris prave: "Vi ĉiuj tiel opinias? Tamen vi ja klare vidas, ke la veteranaj ministoj vivas sekure. Ni ja havas sekurigajn kontraŭrimedojn por protekti la ministrojn."

Lanjing bone komprenas lin. Ŝi estis diplomito de mezlernejo kaj multe pli klera ol la maljunuloj en la vilaĝo. Ŝi klare scias,

ke por konstruado la ŝtato nepre devas havi energion, kaj des pli bezonas tiajn junajn ministrojn kia Along. Malgraŭ ĉio, ŝi esperas havi trankvilan vivon. Ŝi estas tre juna kaj ne povas imagi al si, kiel ŝi povus vivi plu, se Along malaperus for de la mondo.

Fine Along kaj aliaj junuloj de la vilaĝo iris al la karbominejo. Lanjing akompanis lin al aŭtostacio. Ŝi tre ĉagreniĝis. Ŝi ankoraŭ ne promesis edziniĝon al Along. Along vidigis bedaŭron ĉe la adiaŭo, sed kiam la aŭto estis tuj startonta, Lanjing subite saltis en la aŭton kaj mallaŭte diris al Along, kun pala vizaĝo: "Mi iros kune kun vi por esplori la lokon."

Tiam multaj en la minejo moke babilis pri ŝi. Ĉiuj sciis, ke iu nova laboristo venis al la minejo eĉ en akompano de sia fianĉino. Kaj iuj intence laŭtigis sian voĉon, preterpasante ŝian ĉambron: "Estos miraklo, se ŝi ne estos fortimigita kiam ŝi vidos ke ni ĉiuj supren iros kvazaŭ karbobuloj el sub la ŝaktoj."

Ŝi iris en la ŝakton. Same kiel aliaj novaj laboristoj, ŝi surhavis vimenan kaskon kaj ledan rime-non ĉe la talio kaj kunportis kun si akumulatoron. La elektra drateto kunliganta la akumulatoron kun la lampo sur la kasko peze pendis kaj senĉese tiris la kaskon malsupren, ŝi do devis ĉiam teni la kaskon per unu mano. Kaj cetere la kaŭĉukaj botoj estis altaj ĝis la genuo, kaj tial ŝi sentis ĉie sur la korpo pezan premon.

"Ĉu poste Along devas ĉiutage porti tiujn objektojn en laboro?" ŝi pensis en ĉagreno.

Subite ŝin atakis aliaj ĉagrenaj aferoj. Enirinte en la ŝaktan

lifton, ŝi tuj sentis doloron en la oreloj kaj malfacilan spiradon. Irinte laŭ longa malseka ŝtuparo ŝi atingis la ĉefgalerion, kaj tiam ŝi devis esti singardema kontraŭ elektraĵvagonaroj, kaj de tie ĝis la fosejo oni bezonis plian duonhoran iradon. Sed sur la tero, ŝi povas vidi la brilan sunon kaj sentas sin agrable. Kaj sub la tero, ŝi povas vidi nur faskon da lumo de la kaskolampo kaj cetero ŝi ofte stumblis surtretante tabulon aŭ najlon. Irante antaŭen kun aliaj laboristoj, ŝi sentas lacon kaj teruron, kaj de tempo al tempo devas apogi sin al Along. Sed estas mirinde, ke la laboristoj montras nenian timon, sed amike salutas la novvenintojn. Fine ŝia timo estas forpelita de Along. En mallumo la

okuloj de Along brilas per eks-citaj radioj.

Ŝi komprenas Along. Ankaŭ lia patro estis ministro. Antaŭ sia morto li diris al Along: "Estu ministro, se vi volas fariĝi viro inda." Poste li ofte diris al ŝi, ke li volas iri al minejo. Li diris, ke li volas esti klera kaj lerta ministro, li volas krei novan minejon, kian la generacio de lia patro ne vidis. Lanĵing fidus lin kaj bone scias, ke multepromesa junulo devas esti kreiva. Ŝi ĉiam amas Along ĝuste pro tio, ke li estas tia junulo. Ŝi pretas iri malfacilan vojon kune kun li por krei novan vivon. Nur tiuj, kiuj dediĉas sin al kreiva laborado, povas akiri feliĉon.

Ŝi iris hejmen kaj Along restis en la minejo. Iuj mokis Along,

dum aliaj admonis lin reveni hejmen. Sed kiam Lanĵing nerimarkite venis al la minejo por edziniĝi al Along, ĉiuj estis surprizitaj. Multaj aplaudis al ŝi, kaj la ceremonio estis simpla kaj gaja. La nupton ĉeestis ankaŭ la estro de la minejo. Ŝi estis multe emociita kaj sentis fieron.

Nun ŝi volis atingi la minejon per unu paŝo, pensante pri sia edzo kaj liaj kolegoj. Sed ne, ŝi ja ne volis iri tiel rapide, ŝi volis bone rememori la pasintaĵon profitante la tempon de vojirado. La montvojo rememorigis al ŝi ne nur feliĉajn tagojn, sed ankaŭ mizerajn tempojn.

Ĉu ŝi ne iris al Along laŭ tiu vojo en tiu jaro?

Sed ŝi neniel atendis, ke loĝi en la minejo estis tiel malfacile. Along kaj Ŝjaŭ Lin loĝis en sama ĉambro. Kiam ŝi venis al la minejo, Ŝjaŭ Lin devis loĝi en alies ĉambro. Tiel ŝi loĝiĝis en la minejo kaj kontentiĝis, ke ŝi povas kunesti kun sia amata edzo.

Sed post nelonge ŝi sentis, ke al ŝi mankas io. Kio estas tio? Ŝi ne havis klaran koncepton. Ŝi jam lavis ĉiujn liajn littukojn kaj la kulvualon, pretigis ĉiujn trikvestojn necesajn por li, kaj eĉ trikis por Ŝjaŭ Lin kelkajn vestojn. Ĉiutage ŝi manĝis en la komuna manĝejo de la minejo, kio multe oportunigis al ŝi la vivon. Ŝi enuis de malpleno en la koro. Iun tagon ŝi eliris el la ĉambro kaj surpaŝis la aŭtovojon apud la loĝejo. Ŝi vagadis sencele. Post vojturniĝo subite heliĝis ŝiaj okuloj: Flaviĝis la rizo en la kampoj ĉe la vojo kaj ŝi ekflaris agrablan aromon. Ŝi forlasis sian vilaĝon jam antaŭlonge. Eble baldaŭ komenciĝos falĉado en la vilaĝo? Ŝi rememoris la rikoltadon antaŭ sia edziniĝo: Ĉe la komenco de la



falĉado ŝi kaj ŝiaj kamaradinoj, en novaj vestoj kaj kaptukoj, gaje venis al la rizkampo kaj volis falĉi la unuan faskon da rizplantoj. Ili alte suprenfaldis la pantalon-tubojn, la koto maku-lis iliajn vestojn, kaj hirudoj ofte atakis ilin. . . Ho, kiel intensa laborado! Oni laboradis de frua mateno ĝis noktigo. La intensa laborado dolorigis al ili kaj la talion kaj la gambojn, kaj ili povis endormiĝi tuj ekkuŝante. Sed oni neniam sentis malplenon, kiel nun. Ŝi ja komprenis, ke estas nenio alia ol la reala vivo, kiun ŝi perdis. Along iris labori ĉiutage, dum ŝi havis nenion por fari. Ŝi ĉagreniĝis kaj ekploris.

Vespere, kiam Along revenis de laboro, ŝi diris al li: “Mi devas ja reveni hejmen, mi devas vivi mian vivon, kiel ajn malfacila ĝi estos.”

Along diris kun bedaŭro: “Ĉu vi malamas min, ke mi ne estas kapabla havigi al vi komfortan vivon?”

Lanĵing diris: “Ne tiel diru. Kiel edzino de ministro, mi devas meriti la nomon. Ĉi tie mi havas nenion por fari, kaj cetere, vi bezonas dividi vian energion por prizorgi min. Post kiam mi revenos hejmen kaj nia vivo pliboniĝos, vi povos labori per via tuta energio.”

Ŝi planis loĝi ankoraŭ kelkajn tagojn. Sed vespere, kiam ŝi eliris preni akvon, ŝi renkontis Ŝjaŭ Lin, kiu estis iranta al la ŝakto kun litajo sub la brako. “Ŝjaŭ Lin, kien vi iras? ŝi mire demandis.

Ŝjaŭ Lin respondis ĝenate: “Venis la edzino de mia nova samĉambro, kaj mi nun iras tranokti en la manovrejo apud la ŝakto.”

Ŝi ĉagreniĝis kaj larmis. Ŝi tuj iris al Along kaj diris al li, ke ŝi foriros morgaŭ, por ke Ŝjaŭ Lin povu reveni en sian propran ĉambron. Ŝi bone sciis, ke edzino de ministro devas prizorgi ne nur sian edzon, sed ankaŭ liajn amikojn.

Along petis forpermeson de duontago por akompani ŝin al la aŭtostacio. Survoje ŝi diris nenion. Kion ili ankoraŭ devas diri?

Hej, ĉian mizeran vivon oni jam eltenis. En la pasintaj du jaroj la agrikultura produktado multe progresis kaj la vivo de la kamparanoj iom post iom pliboniĝis. Along studis en la postlabora laborista universitato kaj revenis al la hejmvilaĝo en feriaj tagoj por helpi ŝin en kamplaboroj. Poste Lanĵing prenis sur sin ĉiujn kamplaborojn kaj domlaborojn kaj vizitis la minejon en libera tempo.

Antaŭ tri monatoj Along revenis hejmen kaj diris al Lanĵing kun rideto: “Lanĵing, ĉu ni ne devas havi ion plie?”

“Kion vi volas?” Lanĵing ne komprenis lin, ĉar ili jam havis ĉion necesan.

Along flustris al ŝi en la ore-lon: “Infanon!”


Ŝi tamen ekploris, kio teruris Along. En tiu tempo Lanĵing sentis kaj ĝojon kaj doloron. Ŝi gravediĝis antaŭ du jaroj. Sed foje, kiam ŝi iris kolekti brullignon sur monto, ŝi glitfalis kaj pro tio abortis. Post tio Along komencis studi en la laborista universitato, kaj por ne ŝarĝi lin per prizorgado al la bebo, ŝi alprenis rimedojn kontraŭ gravedigo. Along tre zorgis pri ŝi kaj ĉiam timis, ke io okazos al ŝi. Por trankviligi lin, ŝi ofte diris al Along, ke abortinto devas ripozi

longan tempon antaŭ refoja gravedigo. Nun Along estis finonta baldaŭ la studon kaj estis tempo por ke li fariĝu patro.

Nun ŝi ja iras informi lin, ke li baldaŭ fariĝos patro. Ho, li certe falos en ekstazan felicon. . .

Lanĵing ĉiam klare memoras la mienon de la ridanta edzo. Ridante, li ĉiam kuntiras la nazon, duonfermas la okulojn, kaj la rido estas tre laŭta. Kaj ofte lia komika mieno ridigas ĉiujn ĉeestantojn. Tiam Lanĵing ĉiam sentas grandan plezuron en la koro.

Ha, ŝi jam vidis la minejon. La verdaj arboj, la ruĝaj tegmentoj, la blankaj muroj. . . denove aperis multaj novaj domoj. Ŝi aŭdis de Along, ke la minejo planis konstrui gastejon, kaj tiam la edzinoj de la ministroj povos loĝi en la gastejo. Ĉu ŝi povos loĝi en la gastejo ĉi-foje kiel gastejo? Imagante, ke ili ambaŭ baldaŭ kunloĝos en la gastejo, ŝi ruĝiĝis. Kion diri al li ĉe la intervidigo? Ĉu decas diri al li, ke ili baldaŭ havos infanon?



EN 1986

LA 71-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO OKAZOS EN ĈINIO!

Ĉu vin interesas la bela orienta antikva lando?
Jen ni rekomendas al vi la ĵus aperintan libron:

40 Vidindaj Lokoj en Ĉinio

Tiu ĉi libro konigas al vi 40 plej famajn kaj facile viziteblajn vidindajn lokojn, inkluzive de la Granda Muro, la Malpermesita Urbo, la Somera Palaco, la Tri Montgorĝoj ĉe la rivero Jangzi, la enterigita terakota legio k.t.p. Krom la priskriboj pri la pejzaĝoj vi legos ankaŭ interesajn legendojn kaj popolrakontojn pri tiuj lokoj. Post la legado vi ekhavos ankaŭ iom da historiaj scioj pri Ĉinio. Kun koloraj bildoj kaj pentraĵoj.

Esperantigita de Censinio

Polurita de Geoffrey Sutton


Ilustrita de Lu Dacheng

Eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Formato: 119×185mm. 272 pĝ.

Prezo: £1,90 US\$3,90

Numero: 12-Es-1825P



Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPC
aŭ Internacia Libro-

Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

MARO EKSPLUATOTA

LA maro de la terglobo havas areon de 360 milionoj da kvadrataj kilometroj, kiuj konsistigas 71% de la tersurfaco.

Antaŭ jarmiloj homoj jam komencis ekspluati la maron kaj okupi sin per maraj fiŝado kaj transportado. Sed ĝis la sojlo de la kuranta jarcento oni konis la maron nur supraĵe. Post la Dua Mondmilito la mara ekonomio de la mondo rapide disvolviĝis. Precipe de la 60-aj jaroj, tra la tuta mondo leviĝis alttajo de esplorado kaj ekspluatado de la maro.

Por ekspliki la signifon de ekspluatado de la maro, unu vorto

sufiĉas: sen maro la homa socio ne povos disvolviĝi en la estonteco. Kun la disvolviĝo de la homa socio, la plivastiĝo de la ekonomia sfero kaj la progreso de scienco kaj tekniko, precipe kun la kresko de la loĝantaro de la mondo, pli kaj pli malsufiĉas la kontinentaj riĉfonto kaj energifonto, pli kaj pli multaj landoj metas sian esperon sur la ekspluatadon kaj utiligadon de la maraj riĉfonto kaj energifonto. Fakte, la maro havas ja neelĉerpeblan latentforton por ekspluati kaj povas provizi la homaron per ĉio, kion ĝi akiras de la kontinentoj. Nuntempe en la mondo la ekspluatado de la maroj estas

rigardata kiel unu el la karakterizaĵoj de la nova teknika revolucio.

Fremdlandaj sciencistoj antaŭdiris, ke la maro fariĝos unue la plej granda manĝo-provizejo de la homaro kaj la abundaj marrestaĵoj fariĝos ĉefa fonto de la manĝaĵoj por ĝi. Ĉe multaj golfoj kaj riverbuŝoj oni konstruos laŭplane bredejojn de marrestaĵoj, regatajn de komputeroj, kaj samtempe konstruos funde de la proksimaj maroj fiŝistajn vilaĝojn kaj fiŝbredejojn. La fiŝistoj loĝos en flosaj kristalaj globoj en la maro aŭ en ĉambroj kun kupolo kaj bredos diversspecajn fiŝojn rajdante sur enakva motorciklo. Laŭ kalkulo, en tiu tempo la tuta mondo konsumos 180 milionojn da tunoj da fiŝoj, t. e. trioble pli multe ol en la nuna tempo.

La mara mineralo kaj energifonto estos ekspluatataj paŝon post paŝo. Sciencistoj el FR Germanio konstatis, ke en la jaro 2000 almenaŭ kvarono de la industriaj krudmaterialoj estos akirita el la maro. Uranio bezonata de Japanio estos akirita tute el la maro. La plej granda tajdelektrejo konstruita de Francio produktas en unu jaro 544 milionojn da kilovatthoroj da elektro. Francio ankaŭ planas konstrui, en la fino de la kuranta jarcento, tri digojn en la maro kun areo de 2 000 kvadrataj kilometroj kaj tiel akiros de tajdo 35 miliardojn da kilovatthoroj da elektro. Britio investis grandan sumon por esplori marondojn kaj planas konstrui ondoenergian elektrejon kun kapacito de miliono da kilo-


Usona mar-esploranto laboras funde de maro.




vattoj. Usono utiligos la varmfluon ĉe la orienta marbordo kaj konstruos tie 500 elektrejojn de mara varmo por akiri 200 milionojn da kilovattoj da elektro. Usono antaŭkalkulis en sia projekto por ekspluati la naturon, ke en la jaro 2 000 ĝi havigos al si 400 miliardojn da dolaroj el ekspluatado de la maro, kiuj konsistigos 20% de la totala produktovaloro de ĝia tiamacia ekonomio.

Ĉinio estas unu el la grandaj marlandoj de la mondo. Ĝi posedas Bohaj-maron, la Flavan Maron, la Orientan Ĉinan Maron kaj la Sudan Ĉinan Maron sume kun areo de 4.7 milionoj da kvadrataj kilometroj kaj la marborda linio de pli ol 18 000 kilometroj. La ĉinamarregiono havas mildan klimaton, favorajn naturajn kondiĉojn kaj abundon da mar-estaĵoj. En tiuj maroj abundas nafto kaj natura gaso. En la posta periodo de la 50-aj jaroj Ĉinio faris la unuan ĝeneralan esploron pri la proksimaj maroj kaj en la 70-aj jaroj ĝi dufoje faris sintezan esploron pri specifa regiono de Pacifiko. Nun Ĉinio havas pli ol 17 000 sciencistojn pri mar-ekspluatado kaj 168 diversajn ŝipojn por mar-esplorado. En Ĉinio ĉ. 4 milionoj da personoj laboras por mara produktado. Oni povas diri, ke Ĉinio havas kondiĉojn por pluapase disvolvi la maran ekonomion kaj ĝia perspektivo por ekspluati la maron estas brila.

La batalo pro la mara riĉfonto kaj aliaj marprofitoj ankaŭ disvolviĝas kun progreso de la mara afero, kio kaŭzas gravan ŝanĝon al la Internacia Marleĝo. La konferenco pri la marleĝo okazigita de UN jam aprobis novan Konvencion pri la Marleĝo kaj faris difinojn pri mar-teritoria



Ĉinaj mar-esplorantoj faras eksperimenton pri ekstraktado de uranio el marakvo.



Laborantoj de ĉina mar-esplora ŝipo enmetas hidrometron.

larĝeco de 12 marmejloj, kontinenta breto, ekskluziva ekonomia regiono kaj administrado de internacia marfundo.

En la estonteco, dank' al progresanta scienco kaj tekniko, la

homaro akiros rimarkindan sukceson en ekspluatado kaj utiligado de la maro. Estas tute sendube, ke jam alproksimiĝas la erao, en kiu oni ekspluatas la maron por feliĉigi la homaron.

Paco kaj milito inter la Norda Song-dinastio kaj Ljaŭ, Okcidenta Ŝja kaj Ĝin

de BA HONG

ĈINIO estas lando kun multaj naciecoj. 400 jaroj de la dinastioj Song kaj Jŭan (960-1368 p. K.) estis la kvara historia periodo de la granda kunmiksiĝo por diversaj naciecoj de Ĉinio post la periodoj de Hŭangdi (Huangdi), Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj, la Tri Regnoj, Ĝin (Jin) kaj Nordaj kaj Sudaj Dinastioj. Tiuj militaj jaroj por la diversaj naciecoj postlasis mizerplenajn paĝojn kaj animskuajn rakontojn en la historio. Ĉio ĉi jam forpasis kaj la posteuloj de la tiam interbatalantaj diversnaciecaj popoloj jam harmoniis kiel granda familio. Tamen la historiaj aktivadoj estas enskribitaj en romanojn aŭ dramojn kaj cirkulas inter la popoloj eĉ hodiaŭ.

ALIANCIĜO DE ĈANĜOŬ

Post la fondiĝo de Ljaŭ-regno la norda nacimalplimulto Ĉjidan (Qidan) ofte invadis la Nordan Song-dinastion, kaj tiu lasta devigite estis en ofensivo. En 1004 p. K. la regno Ljaŭ sendis armeon kun 200 000 militistoj suden ataki la Nordan Song-dinastion, la armeo konkeris Ĉanĝoŭ (sudokcidente de la nuna Pujang de Henan-provinco) kaj direktis sian lancopinton suden, kio serioze minacis Kajfeng, la ĉefurbon de la Norda Song-dinastio.

Tiam la kortego de Song-dinastio dronis en ĥaoso, imperiestro Ĝenzong alvokis siajn korte-

ganojn por diskuti pri la kontraŭrimedo. Timante la potencon armeon de Ljaŭ, multaj korteganoj proponis transloki la ĉefurbon suden. Sed ĉefministro Koŭ Ĝun persistis en rezistado. Li diris al la suvereno: "Via imperiestra moŝto devas persone komandi la armeon por ataki la malamikojn. Se vi forlasus la ĉefurbon kaj fuĝus for, la popolo do perdus fidon al la venko kaj la malamikoj penetrus profunde en nian landon. Se tio okazus, la imperio falus en danĝeron de pereco."

Persvadite de Koŭ Ĝun, imperiestro Ĝenzong decidis persone komandi sian armeon al ekspedicio. Gajninte venkon en la unua batalo, la armeo de Song-dinastio transpasis la Flavan Riveron kaj eniris la urbon Ĉanĝoŭ. Tiam miloj da kavalerianoj de Ljaŭ sturmis la urbon. Koŭ Ĝun ordonis ataki ilin. La militistoj de Song ekstermis pliparton de la malamikoj. Suferinte plurajn malvenkojn, Ljaŭ-regno petis paciĝon kun Song-dinastio. Koŭ Ĝun firme oponis kontraŭ la paciĝo kun la malamikoj kaj proponis repreni la perditan teritorion en venko. Sed la imperiestro, sendecida en la rezistado, aprobis la interpaciĝon. La kondiĉoj por la interpaciĝo estis multe malfavoraj al la Norda Song-dinastio. Ĝi difinis, ke la Norda Song-dinastio ĉiujare donos al Ljaŭ-regno 100 000 taelojn da arĝento kaj 200 000 rulojn da silkaĵo.

Post la paciĝo Koŭ Ĝun estis kalumniita de kompromisuloj kaj ekzilita al malproksima landlimo. Fine li mortis de malĝojo.

Kvankam la imperiestro de la Norda Song-dinastio estis senkapabla kaj la kompromisuloj estis en supereco, tamen pro tio, ke interne de la Ĉjidan-regantoj iris akra batalo por la potenco, la regno Ljaŭ ne povis ataki aliajn regnojn. Sekve de tio dum pli ol cent jaroj regis stabila paco inter Song kaj Ljaŭ.

KAMPANJOJ ĈE HAŬSANĈŬAN

Kiam norde de la Norda Song-dinastio aperis paca situacio, nordokcidente de ĝi leviĝis potenca regno Okcidenta Ŝja. En 1038 p. K. suvereniĝis Jŭanhaŭ de la Okcidenta Ŝja. Li bone konis militajn verkojn kaj leĝojn de han-nacieco, starigis politikan sistemon laŭ tiu de la dinastioj Tang kaj Song, kreis skriban lingvon kaj fondis la regnon Granda Ŝja. Ĝi potenciĝis iom post iom kaj kune kun Song kaj Ljaŭ ekzistis dum longaj jaroj.

La Norda Song-dinastio ne toleris ĝian sendependecon. Ĝi interrompis la landliman negocon kaj prezentis al la publiko afiŝon por kapti Jŭanhaŭ. La lasta indignis kontraŭ tio kaj ofte sendis armeon invadi la landlimon de la Norda Song-dinastio.

Foje, Jŭanhaŭ komandis sian armeon por invadi la Nordan

Song-dinastio, Han Ĉji, la komandanto de Song-armeo, sendis generalon Ĵen Fu kun dek mil soldatoj reataki la invadantojn. Antaŭ la ekiro, Han Ĉji diris al li: “Ĵuanhaŭ estas ruza. Estu singardema kaj faru atakon de la dorso de la malamikoj. Se la situacio estos malfavora, vi embuskigu la armeon ĉe strategia loko por malhelpi la malamikojn veni returne. Neniam subtaksu la malamikojn!”

Survoje Ĵen Fu informiĝis, ke la malamika armeo estas ne granda, li do ordonis ataki. La armeo de Ĵuanhaŭ ŝajnis sin timigita kaj forkuris okcidenten, dume Ĵen Fu kun sia armeo ĝin persekutis. La armeanoj de Song restis sen manĝi en tri sinsekvaj tagoj kaj atingis Haŭŝanĉŭan (norde de la nuna Longde-gubernio de la Ningŝja-a Huj-nacieca

Aŭtonoma Regiono) ĉe la montpiedo de la monto Liŭpan. Tiam ili tre laciĝis kaj haltis por kampadi.

Ĵuanhaŭ jam embuskigis ĉe la montpasejo 100 000-membran armeon kaj ordonis meti 100 argilajn kestojn kun kolomboj ambaŭflanken de la vojo trapasota de la soldatoj de Song.


Frumatene de la sekvanta tago, Ĵen Fu, komandante sian armeon, plu marŝis okcidenten. Survoje soldatoj de Song-dinastio trovis la argilajn kestojn bruantaj. Ili do prenis la kestojn kaj prezentis ilin al Ĵen Fu, kiu senpripense ordonis malfermi ĉiujn kestojn. La 100 kolomboj kun fajfiloj tuj elflugis kaj ŝvebis super Song-armeon. Tion vidinte la embuskantoj tuj atakis Song-armeon en la direkto montrita de

la kolomboj. Song-armeo suferis gravan perdon.

Ĵen Fu pli-ol-dek-foje estis trafita de sagoj, sed ankoraŭ brave batalis kontraŭ la malamikoj. Liaj sekvantoj konsilis al li forkuri. Ĵen diris: “Mi estas generalo de Song-dinastio. Nun mi estas venkita kaj devas batali ĝis morto por la patrolando.” Fine li oferis sian vivon en la batalo kaj la armeo de Song-dinastio estis tute ekstermita. Pro la malvenko Han Ĉji estis malpromociita.

Post la kampanjo Ĵuanhaŭ plurfoje invadis la Nordan Song-dinastion. Kvankam li gajnis venkojn pli-ol-unu-foje, tamen en la batalo lia armeo suferis gravan perdon. Poste Han Ĉji kaj Fan Ĝongjan, fama kortegano de la Norda Song-dinastio, sukcese de-

Kampanjo ĉe Haŭŝanĉŭan



Ilustrita de ĴEN MENGŜJONG

SINDIKATOJ DE ĈINIO

de HONG JING

man laboristaro-oficistaron kun idealo, moralo kaj klereco kaj plene disvolvi la rolon de la laborista klaso kiel la ĉefa forto en konstruado de la socialisma materia kaj spirita civilizacio.

La ĉina sindikato estas tutlanda unueca organizo bazita sur la plej vasta amaso. Ĉiuj fizikaj kaj mensaj laborantoj en fabrikoj kaj oficejoj, sen distingo de sekso, nacieco, okupo kaj religia kredo, se nur ili rekonas la statuton, povas fariĝi ĝiaj membroj.

La Tutĉinia Federacio de Sindikatoj estas la plej alta gvidorgano de la lokaj sindikatoj kaj la fakaj landskalaj sindikatoj de Ĉinio. La Tutlanda Kongreso de Sindikatoj estas ĝia plej alta organo de potenco. Ĝiaj ĉefaj organoj konsistas el la Plenuma Komitato, Konstanta Komitato kaj Sekretariejo.

Kun la disvolviĝo de sindikata laboro la sindikatoj pli kaj pli grandiĝas. En 1982 la Tutĉinia Federacio de Sindikatoj havis 430 000 bazajn unuojn kun 73 310 000 membroj. Por kontentigi la bezonon de la disvolvi-

ANTAŬ nelonge okazis laborakcidento en la Kolora Presejo de Siping en la Nordoriento de Ĉinio: La dekstra mano de iu juna laboristino estis rompita de maŝino.

En la presejo ofte okazis akcidentoj dum longa tempo, pri kio la laboristoj estis malkontentaj. Sep laborantoj de la sindikato en la presejo foje-refoje raportis tion al la vicestro de la presejo, kiu respondecis pri la produktado, kaj faris al li proponon. Sed tiu lasta estis surda al ilia propono, kaj plie kalumniis iun el ili. Por likvidi tian laborstilon, funkciuloj de la sindikato faris raporton al la urba komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj samtempe denunciis tion al ĵurnala redakcio. La urba komitato kaj la ĵurnala redakcio donis grandan atenton al tio kaj faris enketadon, kiu konstatis la raporton. Rezul-

te la vicestro de la presejo estis eksigita je ofico pro la grava eraro. Poste la presejo ellaboris serion da reguloj por sekura laborado.

Estas nemalmultaj la faktoj, ke la bazaj sindikatoj defendas la interesojn de laboristoj kaj subtenas justajn aferojn. Tio estas decidita de la naturo de la sindikato.

La ĉina sindikato estas organizaĵo de la laboristaj amasoj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. La "Statuto de la Ĉina Sindikato" klare difinas la orientiĝon de la sindikata laboro. Tio estas: sub la premiso de la moderniga konstruado de nia lando servi al la oficistoj kaj laboristoj, defendi iliajn leĝajn rajtojn, konduki al ili edukojn ideologian, politikan, kulturan kaj teknikan kun la celo elkulturi discipline-

fendis la landlimon kaj Ĵuanhaŭ ne plu kuraĝis agresi la Nordan Song-dinastion. Li do proponis paciĝon. Ankaŭ Song-registaro timis, ke la regnoj Okcidenta Ŝja kaj Ljaŭ alianciĝos, tial ĝi konsentis la paciĝon kaj reciprokan negocadon. Nominale la Okcidenta Ŝja estis dependa regno de Song-dinastio, sed fakte tiu lasta devis ĉiujare doni al ĝi 72 000 taelojn da arĝento, 153 000 rulojn da silkaĵo kaj 15 000 kg. da

teo. De tiam la nordokcidenta regiono de Song-dinastio stabiligis.

PEREO DE LA NORDA SONG-DINASTIO

En la komenco de la 12-a jarcento, norde de la regno Ljaŭ, t. e. en la regiono de la nunaj Ĉangbaj-montaro, riveroj Hejlongĝjang kaj Songhŭa, leviĝis la nova regno Ĝin fondita de Njuĝen-nacieco. Sub la gvido de

Aguda Ĝin pereigis la regnon Ljaŭ en 1125 p. K.

Vidinte la putran regadon de la Norda Song-dinastio kaj ĝian senefikan nacidefendon, Ĝin faris grandskalan atakon al Song. Imperiestro Hujzong de Song konsterniĝis, haste abdikis la imperiestrecon kaj surtronigis sian filon, tiu estis imperiestro Ĉinzong. Printempe de la sekvanta jaro la armeo de Ĝin transpasis la Flavan Riveron kaj direktis

ĝanta situacio oni fondis 50 lernejojn por diversnivelaj sindikataj kadroj en la tuta lando. Krome ĝiaj bazaj unuoj funkciigis diversformajn kursojn. Ili elkulturis grandan nombron da sindikataj kadroj kaj pli ol dek milionojn da sindikataj aktivuloj. La Tutĉinia Federacio de Sindikatoj eldonas "Gongren Ribao" (Laborista Ĵurnalo). Ankaŭ diversnivelaj sindikatoj eldonas siajn gazetojn. Tiuj eldonaĵoj jam ludas gravan rolon en edukado de oficistoj kaj laboristoj, prezentado de iliaj opinioj kaj interŝanĝo de sperto pri la sindikata laboro.

La ĉinaj sindikatoj akompanis la disvolviĝon de la laborista movado. En 1922 okazis la Unua Tutlanda Labora Kongreso, kiu decidis starigi tutĉinian federacion de sindikatoj. En 1925 okazis la Dua Tutlanda Labora Kongreso kaj fondiĝis la Tutĉinia Federacio de Sindikatoj, kio markis politike kaj organize la unuecon de la laborista movado de Ĉinio. La fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 malfermis novan paĝon en la historio de la ĉinaj sindikatoj kaj la laborista klaso de Ĉinio ekhavis sian propran organizaĵon kun amasa ka-

raktero en la konstruado de la nova vivo sub la socialisma sistemo.

Nun la laborista klaso de Ĉinio fariĝis gvida klaso de la ŝtato. La sindikatoj, kiel amasa organizaĵo de la laboristoj mem, prenas kiel sian centran taskon mobilizadon kaj organizadon de la laboristaj amasoj al la konstruado de la socialisma lando. La diversnivelaj sindikatoj aktive akcelas demokratian administradon de la entreprenoj. La bazaj sindikatoj serioze plenumas la laboron de labor-organoj de la oficista kaj laborista kongreso — la plej alta organo de potenco, faras ĉion eblan por plibonigi la entreprenan administradon. Ekzemple, antaŭ 1980 la Sesa Konstrua Kompanio de Tjanĝin estis subevoluinta unuo kun malorda administrado kaj malbonaj produktaĵoj. La sindikato kunvokis laboristajn reprezentantojn por fari profundan enketon pri la ĉefaj problemoj de produktado kaj administrado, poste okazigis kongreson de oficistoj kaj laboristoj, kiu analizis la kaŭzon, ellaboris naŭ regulojn pri ekzamenado al kadroj, ordigado de laboraj disciplinoj, reformado de sistemo pri premio



Li Jan, elstara vicprezidanto de la sindikato de la Ofseta Presejo de Siping

kaj puno, plibonigado de la vivkondiĉoj de oficistoj kaj laboristoj. Post du jaroj la kompanio fariĝis avangarda kolektivo de Tjanĝin.

Estas grava respondeco por la ĉina sindikato protekti la mastrecon de la oficistoj kaj laboristoj pri la ŝtato kaj iliajn proprajn interesojn. La sindikato faris multajn laborojn en la altigo de kultura kaj teknika nivelo de oficistoj kaj laboristoj, plibonigo de la kondiĉoj de ilia loĝado, reformado de sistemo pri salajro kaj premio, plifortigo de labora sekuro kaj defendado de la interesoj propraj al la oficistinoj kaj laboristinoj.

sian lancopinton al la ĉefurbo de Song-dinastio (la nuna urbo Kaj-feng de Henan-provinco).

Antaŭ la atako de la ferocaj malamikoj la imperiestro kaj nobeloj de la Norda Song-dinastio terurigi kaj volis koncesii sian teritorion por peti pacon. Sed la patriotaj generaloj kaj la vastaj armeo kaj popolo firme postulis rezisti kontraŭ la agresantoj kaj defendi la ĉefurbon.

La imperiestro de Song-dinastio devigite nomumis Li Gang komandanto por defendi la ĉefurbon. Li Gang plurfoje repuŝis la atakon de la malamikoj, sed la kapitulacema imperiestro sendis peti Ĝin pacon kaj eksigis Li Gang je lia ofico. Post kelke da monatoj la armeo de Ĝin konkeris la ĉefurbon kaj kaptis imperiestron Ĉinzong kaj lian patron en 1127 p. K., kio markis

la pereon de la Norda Song-dinastio.

En la sama jaro frato de Ĉinzong imperiestriĝis. En la historio oni nomis lin imperiestro Gaŭzong. Li prenis Lin-an (la nuna urbo Hangĝou de Ĝeĝjang-provinco) kiel sian ĉefurbon. Kaj de tiam la ĉina historio eniris en la periodon de la Suda Song-dinastio.



SPIRA GIMNASTIKO POR KURACI PULMAN EMFIZEMON

de JŪAN ŜJICJŪAN

PULMA emfizemo ofte atakas mezaĝulojn kaj maljunulojn. Pro longa inflamo kaj mallarĝiĝo de la bronkoj la spirado estas malhelpata, la pulmaj alveoloj tro ekspansiigas, kreviĝas kaj perturbas la pulman funkcion. Kronika bronkito, bronka astmo, silikozo kaj pulma tuberkulozo povas kaŭzi pulman emfizemon. Kiam oni suferas tian malsanon, oni tusedas, sputas multe da mukaĵo kaj anhelas. Por kuraci la malsanon, oni devas, krom preni medikamentojn, ankaŭ sin ekzerci ĉefe per spira gimnastiko, ĉar tio povas redukti mukaĵon, mildigi anheladon, vekti apetiton kaj pligrandigi vitalan kapaciton.

La spira gimnastiko konsistas el ses ekzercoj. La fundamenta spirado en la unua ekzerco devas esti farata nature, kaj la spirado en la aliaj ekzercoj estas sama kiel en la unua. Kun pliboniĝo

de la sanstato oni povas fari la aliajn kvin ekzercojn, ĉiufoje ĉ. 15 minutojn, sen kapturiniĝo aŭ laciĝo.

La komenca teniĝo (sama en ĉiuj ekzercoj): stari kviete kaj bonhumore, kun muskoloj malstreĉitaj, aŭ (sidu aŭ kuŝu grava malsanulo) kun piedoj disigitaj tiom larĝe kiel la ŝultroj kaj kun brakoj nature pendantaj malsupren (bildo 1).

Unua Ekzerco: Fundamentaj Movoj

1. Enspiri per la nazo por mallevi la diafragmon kaj levi la ventron (bildo 2).

2. Elspiri per la buŝo, kun kuntiritaj lipoj kaj ŝvelantaj vangoj, por malhelpi la spiran kanalon kaj ellasi la spiron malrapide tra la buŝo. Samtempe kun tio, mallevi la ventron (bildo 3).

Dua Ekzerco: Brustopremaj Movoj

1. Enspiri, levi la brakojn oblikve supren, etendi ilin malantaŭen kaj ekspansiigi la bruston (bildo 4).

2. Elspiri klinante la korpon kaj krucante la brakojn, kaj premi per la manplatoj la malsupran parton de la brusto (bildo 5).

Tria Ekzerco: Turnaj Movoj

1. Fari duonpaŝon per la maldekstra piedo maldekstrenantaŭen kaj enspiri, oblikve levante la brakojn maldekstrenantaŭen (bildo 6).

2. Elspiri, turnante la korpon dekstren-malantaŭen kaj svingante la brakojn dekstren-malsupren (bildo 7).

3. Enspiri same kiel en la unua ekzerco.

4. Elspiri kaj repreni la komenca teniĝon.

5-8. Ripeti la movojn en la inversa direkto.

Bildo 1



Bildo 2



Bildo 3



Bildo 4





Bildo 5



Bildo 6



Bildo 7



Bildo 8

Kvina Ekzerco: Korpoklinaj Movoj

1. Levi la brakojn horizontale antaŭen kaj enspiri (bildo 8).
2. Turni la korpon maldekstren kaj elspiri turnante la bruston (bildo 9).
3. Enspiri same kiel en la unua ekzerco.
4. Elspiri kaj repreni la komencan teniĝon.
- 5-8. Ripeti la movojn en la inversa direkto.

Kvara Ekzerco: Korpoturnaj Movoj

1. Levi la brakojn horizonta-

le flanken, ekspansiigi la bruston kaj enspiri (bildo 10).

2. Premi per la maldekstra mano la dekstran-malsupran parton de la brusto, levi la dekstran brakon, klini maldekstren la supran parton de la korpo kaj elspiri (bildo 11).
3. Enspiri same kiel en la unua ekzerco.
4. Elspiri kaj repreni la komencan teniĝon.
- 5-8. Ripeti la movojn en la inversa direkto.

Sesa Ekzerco: Gamboĉirkaŭprenaj Movoj

1. Levi la brakojn horizon-

tale antaŭen kaj enspiri (bildo 8).

2. Fleksi la maldekstran gambon, klini la korpon, ĉirkaŭpreni la gambon, premi la ventron per la fleksita gambo kaj elspiri (bildo 12).
3. Enspiri same kiel en la unua ekzerco.
4. Elspiri kaj repreni la komencan teniĝon.
- 5-8. Fari la samon per la dekstra gambo.

La movoj de ĉiu ekzerco povas esti farataj dufoje aŭ kvarfoje, sed la ritmoj devas esti diferencaj ĉe la farantoj de la gimnastiko, ĉar ili spiras ne same rapide.

Bildo 9

Bildo 10

Bildo 11

Bildo 12



第五课

Kvina Leciono

1. vortoj

	han-lingvo	han-lingva fonetika alfabeto	Esperanto
在 ¹	(prep., verbo, adv.)	zài	en
工作	(verbo, substantivo)	gōngzuò	labor-
工厂	(substantivo)	gōngchǎng	fabriko
职业	(substantivo)	zhíyè	okupo
工人 ²	(substantivo)	gōngrén	laboristo
您 ³	(personpronomo)	nín	vi
职员 ²	(substantivo)	zhíyuán	oficisto

2. teksto

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

安娜: “你在哪里工作?”⁴

Annà: “Nǐ zài nǎlǐ gōngzuò?”

vi en kie labor-

Anna: “Kie vi laboras?”

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

林红: “我在工厂工作。”

Lín Hóng: “Wǒ zài gōngchǎng gōngzuò.”

mi en fabriko labor-

Lin Hong: “Mi laboras en fabriko.”

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

安娜: “你的职业是什么?”

Annà: “Nǐde zhíyè shì shénme?”

via okupo est- kio

Anna: “Kio estas via okupo?”

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

林红: “工人。您是职员吗?”

Lín Hóng: “Gōngrén. Nín shì zhíyuán ma?”

laboristo vi est- oficisto ĉu

Lin Hong: “Laboristo. Ĉu vi estas oficisto?”

han-lingvo

HFA

laŭvorta traduko

Esp-a traduko

安娜: “是, 我是职员。”

Annà: “Shì, wǒ shì zhíyuán.”

jes mi est- oficisto

Anna: “Jes, mi estas oficisto.”

Klarigoj

- “在” (zài): En la teksto de tiu ĉi leciono ĝi estas uzata kiel prepozicio. Ĝi povas montri la lokon, interne de kiu estas io aŭ iu.
- “人” (rén) kaj “员” (yuán) ambaŭ estas sufiksoj kun la sama senco de “-isto” en la vortoj de tiu leciono.
- “您” (nín): ĝentila formo de “你” (nǐ).

(daŭrigo de p. 15)

cia Filma Festivalo, en kiu partoprenis 62 landoj; la ĉina bilda filmo «Tintilo de Cervo» ricevis «Specialan Premion» en la Dektria Moskva Internacia Filma Festivalo, en kiu partoprenis 104 landoj kun pli ol 200 filmoj; la ĉina infana rakont-filmo «Fonto Lirlanta» ricevis la plej altan premion de «Ora Elefanto» en la Tria Hinda Internacia Junulara Filma Festivalo, en kiu partoprenis multaj landoj kun 89 filmoj.

SEP ORAJ MEDALOJ POR ĈINAJ PLONĜISTOJ

Ĉinaj plonĝistoj, kiuj partoprenis en la Kruca Internacia Rondira Konkurso de Plonĝado okazinta en Novzelando kaj Aŭstralio en februaro 1984, akiris sep orajn, sep arĝentajn kaj kvin kuprajn medalojn, kaj tiel gajnis la unuan lokon per totalaj poentoj. La konkurson ĉeestis famaj plonĝistoj el Usono, Ĉinio, Kanado, Britio, Aŭstralio kaj Novzelando.

KALIGRAFAJA KAJ PENTRAJA EKSPozICIO DE NAŬ-JARA KNABINO

La kaligrafaĵa kaj pentraĵa ekspozicio de la naŭ-jara knabino Li

Cong okazis en la urbo Nanĉang de sudorienta Ĉinio. Plejparto de la eksponitaj 33 ĉinstilaj pentraĵoj kaj 49 kaligrafaĵoj estis ŝiaj novaj verkoj.

Li Cong estas mezlernejano. De sia kvar-jara aĝo ŝi komencis lerni kaligrafion kaj pentradon. Ŝiaj verkoj plurfoje estis premiitaj en enlandaj konkursoj de infanaj kaligrafaĵoj kaj pentraĵoj. Ŝia «Bildo de Cent Kokoj» akiris arĝentan medalon en la internacia konkurso de infanaj pentraĵoj okazinta en Hindio.

KONCERTO DE ĈINAJ MUZIKISTOJ PREMIITAJ EN INTERNACIAJ KONKURSOJ

La Prezent-arta Komisiono sub la Ĉina Muzikista Asocio kaj la Centra Konservatorio kune okazigis en februaro koncerton de ĉinaj muzikistoj premiitaj en internaciaj konkursoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio 119 ĉinaj muzikistoj estis premiitaj en diversnivelaĵoj kaj diversbranĉaj internaciaj konkursoj. Ili akiris sume 126 individuajn kaj 13 kolektivajn premiojn.

En la koncerto prezentis 15 pekinaj muzikistoj, kiuj pli-ol-unufoje akiris altajn premiojn en internaciaj konkursoj.

EKSPozICIO DE MEDICINAJ INSTRUMENTOJ EN PEKINO

En la fino de februaro kaj la unua tagdeko de marto, 1984 okazis en Pekino la Ekspozicio de Diverslandaj Medicinaj Instrumentoj. Pli ol 200 kompanioj el Aŭstrio, Danlando, Francio, FR Germanio, Italio, Japanio, Svedio, Svisio, Britio, Sovetunio kaj Usono eksponis en ĝi aŭtomatajn biokeemiajn kaj X-radiajn analizilojn, centrifugilojn kaj jonajn analizilojn, elektronikajn mikroskopojn kaj aliajn. Dum la ekspozicio partoprenantoj faris intertraktadon pri tekniko kaj komerco kun ĉinaj fakuloj kaj interkonsiliĝis kun ili pri la kunlaboro en ekonomio kaj tekniko.



-
4. Pri vortordo de demandfrazo: Se oni volas demandi pri jes aŭ ne, estas necese nur meti la partikulon “吗” ĉe la fino de la indika frazo. Ekzemple: “你是工人” (simpla indika frazo. Esp-e: “Vi estas laboristo.”) “你是工人吗?” (demanda frazo. Esp-e: “Ĉu vi estas laboristo?) Se oni volas demandi speciale pri io, estas necese uzi la demand-pronomon “什么” (Vidu la 3-an lecionon . . . Por demandi pri iu ni prezentos al vi alian fraztipon en venonta leciono.) La lokiĝoj de “什么” en malsamaj frazoj estas ne fiksitaj. “什么” povas funkcii kiel subjekto aŭ predikato. Pli detalan klarigon pri tio ni donos al vi iom poste.

Noto: Al han-lingvo mankas morfologia ŝanĝiĝo pri persono, tenso, genro, kazo, gramatika nombro, ktp. Tio estas la plej rimarkinda en la gramatiko de han-lingvo. Tre gravan rolon ludas la vortordo, kiu estas ankaŭ gramatika rimedo en la han-lingvo. “Subjekto + predikato” estas ordinara vortordo de la han-lingva frazo.

PROKSIME DE HUHHOT

de MEJ ĜI

TRAPASINTE Ĝangĝjakoŭ, la Granda Muro daŭre sin etendas okcidenten kaj fariĝis limo inter la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kaj la provinco Ŝanŝji. En la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio situanta norde de la Granda Muro loĝis ĉefe nacimalplimulto en la ĉina historio. Tiuj nacimalplimulto ofte invadis suden. Por defendi sian nordan landliman regionon la feŭdaj regantoj de la pasintaj dinastioj tie konstruis Grandan Muron kaj starigis fuortojn, tial en la loko vidiĝas multaj muroj.

LEGENDO PRI BELULINO ŬANG ĜAŬĜJUN

Estas ĉarma la frua aŭtuno norde de la Granda Muro. Mi trajne veturis al Huhhot, ĉefurbo de la aŭtonoma regiono, kaj vizitis tombon de Ŭang Ĝaŭĝjun, apud bordo de la rivero Dahej en la suda antaŭurbo. Dum la pli ol dumil jaroj cirkulas belaj legendoj pri Ŭang.

En la 51-a a. K. paco regis sur la antikva batalkampoj norde de la Granda Muro. Huhanja, ĉefo de la hunoj, persone venis al Ĉang'an (la nuna Ŝji'an de Ŝenŝji-provinco), ĉefurbo de la Okcidenta Han-dinastio, por peti boparenciĝon kun Han-imperio. La imperiestro Jŭandi konsentis

kaj donacis al li la palacan knabinon Ŭang Ĝaŭĝjun.

Legendo diris ke Ŭang estis bela kamparana knabino kaj estis sendita en la imperiestran palacon. Tiam multe da knabinoj estis disponataj de la imperiestro. Li elektis iun ajn el ili kiel sian akompanan kundormanton laŭ ilia portreto. Ŭang ne volis ŝmiri la manon de la palaca pentristo, pro kio la malgrandanima pentristo ne reaperigis ŝian veran belecon en la portreto kaj la imperiestro ne elektis ŝin. Sed kiam Ŭang adiaŭis la imperiestron ĉe sia forveturo, la imperiestro stuporiĝis antaŭ ŝia beleco. Kvankam li bedaŭris tion, tamen estis jam malfrue. La suvereno eksplodis de kolero kaj ordonis mortigi la pentriston.

Eskortite de la oficistoj de Han-imperio kaj hunoj, Ŭang Ĝaŭĝjun veturis norden de la Granda Muro. La huna ĉefo Huhanja nomumis ŝin Huna Paca *Janĝi* (*Janĝi* estas edzino de huna ĉefo). Ekde tiam dum jardekoj harmonie vivis la hanoj kaj hunoj kaj la rakonto pri Ŭang Ĝaŭĝjun legendiĝis inter la du naciecoj.

La tombo de Ŭang Ĝaŭĝjun estas teramaso 33 metrojn alta, antaŭe kun teraso kaj ŝtuparo. Antaŭ kaj sur la tombo ombrata

de arboj estas pavilonoj. Oni diris al mi, ke vintre kiam ĉio ekster la Granda Muro vestiĝis blanke, nur tiu tombo kovriĝas de verdaĵoj, pro kio ĝi nomiĝas ankaŭ Verda Tombo. Tion pensante, mi pretervole imagis al mi la antikvan scenon: Karavano de ĉevaloj malrapide moviĝas antaŭen sur la dezerto, donante longajn ombrojn kaj elŝante belsonan tintadon. Surĉevalo rajdas la belulino Ŭang Ĝaŭĝjun. . .


Hodiaŭ sur la tero de la Interna Mongolio kun 1 200 000 kvadrataj kilometroj vivas mongola, hana kaj aliaj 24 ĉinaj naciecoj kun 20 milionoj da loĝantoj kune konstruantaj la nordan regionon de Ĉinio. Multaj hanoj transloĝiĝintaj tien el la landinterno rigardas la lokon sia dua hejmloko, inicante siajn avangardajn kulturon kaj produktan teknon al la mongolaj gefratoj. Hodiaŭ la Granda Muro ne plu estas limo dividanta la ĉinajn naciecojn, sed fariĝis simbolo de ilia unuiginta progreso.

LA GRANDA MURO ĈE MONTPIEDO DE JINŜAN

Forlasinte la tombon de Ŭang Ĝaŭĝjun, mi vizitis la ruinon de la antikva Granda Muro.

La totala longeco de la antikva Granda Muro superas 50 mil

SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO



kilometrojn, sed ĝia duono kuŝas en la Interna Mongolio. En la regiono troviĝas Grandaj Muroj konstruitaj en la periodo Militantaj Regnoj, la dinastioj Ĉin, Han, Ĝin kaj Ming. Starante sur la monto Daĉing norde de Huhhot je 10 km mi vidis ke malproksime la Granda Muro ondas de oriente okcidenten en la montaro Jinŝan. Jen la Granda Muro de Ĝaŭ-regno.

En la lasta periodo de la kvara jarcento a. K. la teritorio de la regno Ĝaŭ jam kovris sudon de la monto Daĉing. Antaŭ sia najbaro, la nacimalplimulto Linhu kun bravaj rajdistoj, la militĉaroj kaj infanterianoj de Ĝaŭ-regno kaj aliaj internaj han-naciecaj regnoj estas multe pli malsupe-

raj. Por sin defendi kaj daŭre disvastigi sian teritorion, la reĝo Uling de Ĝaŭ-regno unue ordonis demeti la veston de hanoj: robo kun vasta maniko, kaj sin vesti per nacimalplimultaj jakoj kaj sin kutimigi al rajdado kaj luktado. Li starigis unuan kavalerion de hanoj kaj okupis la vastan regionon sude de la montaro Jinŝan. Ĉ. 396 a.K. la regno Ĝaŭ konstruis la Grandan Muron ĉi tie. La ekzistanta parto malpli ol 2 metrojn alta de la Granda Muro estas plej frue konstruita en Ĉinio.

La Granda Muro de Ĝin-dinastio konstruita en la orienta parto de la Interna Mongolio en 12-13-a jc. p. K. estas la unua tia konstruaĵo de la ĉinaj nacimal-


plimultoj. Ĉe ĝia ekstera flanko estis tranĉeo. La 490-kilometra muro de Ming-dinastio (1368-1644) kuŝanta ĉe la limo de Ŝanŝji kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio estas meza parto de la Granda Muro. La muro plejparte kuŝas inter la altaj montoj. Parto de ĝi, bone konservita, aspektas impone kaj estas komparebla eĉ kun tiu ĉe Badaling de Pekino. La muro kun fortresoj kaj fuortoj kvazaŭ fadeno kun perloj kuŝas sur nia vasta teritorio.

La pejzaĝoj vekas mian imagon pri la antikveco. La pluraj Grandaj Muroj montris la oftecon de la militoj. Garnizonis tie certe multe da armeanoj, tamen kie nun kuŝas iliaj skeletoj? La garnizontaj soldatoj vivis malfacile, tage ili ofte sange batalis kontraŭ agresantoj kaj nokte ili en kiraso sidis en la fuortoj. Ĉu ili povis ne suferi de nostalgio? Tiam soldatoj ekblovis fluton de la nordaj nacimalplimultoj. La tristaj tonoj flugis malproksimen. Tiel pensante, mi eksimpatiiis la antikvajn garnizontajn soldatojn.

NORDA MORO

En la okuloj de sudanoj, la loko ekster la Granda Muro estas plena de romantiko: senlime vasta herbejo, moviĝema dezerto, blankaj ŝafaroj, kurantaj ĉevaloj

Karavano sur dezerto



kaj ondantaj montoj, ĉio ĉi tio formis la originalan pejzaĝon de la loko. Mi transgrimpis la monton Daĉing kaj atingis paŝtistan vilaĝon je 150 km for de la urbo Huhhot. Tie la bravaj kaj malkaŝemaj mongoloj kun simpla kaj sincera karaktero impresis min forte.

La vilaĝo kovras 250 kvadratajn kilometrojn kun pli ol 300 loĝantoj, el kiuj 83% estas mongoloj. Enirinte la vilaĝon mi vidis longan vicon da jurtoj, tradiciaj loĝejoj de mongoloj. La jurtoj el dikaj blankaj feltoj kun ronda malsupra parto kaj pinta supro estas subtenataj per framoj de stangoj. Tage oni malfermas la lukon por enlasi sunradiojn kaj nokte oni fermas ĝin por teni varmon. Estas agrable loĝi en ĝi en la tuta jaro. La jurtoj estas facile malmunteblaj kaj transporteblaj. Ili estas ne malhaveblaj por la nomadoj. Nun la fikse loĝantaj paŝtistoj loĝas en brikdomoj kaj la jurtoj malmultiĝis. La jurtoj viditaj de mi estas starigitaj speciale por turistoj.

La mongoloj estas gastamaj, kion eble decidus ilia nomada


vivo. Oni diris al mi, ke tage ili eliras por paŝti la brutojn sen ŝlosi la pordon. Preterirantoj povas eniri laŭplaĉe, trinki, manĝi kaj ripozi, kio neniom ofendas la mastron.

Mi eniris en iun grandan jurton kaj sidiĝis, la fervora mastro prezentis al mi rostitan rizon, laktaĵon kaj aliajn manĝaĵojn kaj proponis al ĉiu el ni teon kun lakto, nemankigeblan trinkaĵon de la paŝtistoj. En trinkado oni kutimas enmeti salon kaj iam rostitan rizon por pli bongustigi la trinkaĵon.

Tempo pasis en babilado, venis horo por vespermanĝo. Min plej interesis la plado mongola speciale por regali la gastojn — kuirita tuta ŝafo. Mi imitis la gastiganton, deostigante viandon per tranĉilo, kaj manĝis. La gastiganto senĉese proponis al mi alkoholaĵon kaj ekkantis toston. La mongoloj drinkas preskaŭ ĉe ĉiu manĝo, precipe ĉe gastigado. La mastro unue proponas alkoholaĵon trifoje. Tiam la gastoj devas levi la tason super sian kapon kaj eltrinki per unu tiro por esprimi sian respekton al la mas-

tro. Post tio la mastro kaj la gastoj ĝoje trinkas ĝis ebriiĝo.

La nokta kurteno vualis la belan stepon. En la sekvanta mateno, kiam la krepusko forpelis la noktan mallumon, ni forlasis la rosplenan stepon kaj veturis al la fama Aŭbaŭ-monteto. Starante sur la monteto ni vidis ke malproksime ondas la montoj, sur la verda stepo nigre punktiĝas gregoj da ĉevaloj kaj kameloj. Aŭbaŭ ĝenerale troviĝas ĉe la plej supra loko en la tereno de ĉiu mongola tribo kaj estas necesa por ĉiu mongola tribo. Ĝi estas amasigitaj ŝtonoj en formo de pagodo. Iuj diris, ke ĝi funkcias kiel vojmontrilo, aliaj diris, ke ĝi funkcias kiel kultejo kaj la triaj diris, ke ĝi estas loko por la junaj geamantoj. Legendo diras, ke sur la monteto vivis Amoro. La amo fariĝos pli pura, se la geamantoj tie preĝas al la Amoro. Se oni demandas, kion mi preferas el la supre menciitaj, mi respondos, ke mi inklinas al la lasta. Iu sanktulo diris, kie estas homo, tie estas amo, sekve tie estas feliĉo.




La tombo de Ŭang Ĝaŭĝjun

SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO (5)

AŬTONOMA REGIONO DE INTERNA MONGOLIO NORDE DE LA ANTIKA GRANDA MURO

Fotoj de ĈJU ŬEJBO

Hejmrevenanta paŝtataro



La ruino de la antikva
Granda Muro trapasan-
ta la stepon de Interna
Mongolio







Reciproki silkrubandojn estas intervidiĝa ceremonio de mongoloj.




Muzikado por lamaa danco





Parto de mongoloj kredas lamaïsmo. Jen lamaoj en dancado.




Bongusta rostita ŝafajo por gastoj

Sunsubiro
sur stepo


La ĉerko de Ĝengis-Hano (la meza) kaj la ĉerkoj de liaj edzinoj (ambaŭflanke) en Iĝinholŭo de la Interna Mongolio




Popolaj Meti- artaĵoj de Ŝandong- provinco



Kampanaj infanoj ofte portas ŝuojn kaj ĉapon kun tigra kapo farita el koloraj tolpecetoj, kio simbolas sanan kreskadon.





Telero kun bildo de kapro kaj katuno kun desegno de papilio



Artisto de paper-tondaĵoj en verkado



Kajto havas historion de dumil jaroj en Ĉinio. La foto montras metiiston en farado de kajto.



La ksilografia novjara bildo de Ŭejŝjan-gubernio kun popola gusto havas longan historion.

8152

